
Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Januaro - Februaro 2016 | n-ro 01–02 (1327-1328)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Ĉiame je la servo de libero

Falsajn printempojn ĉene ili muntas,
artefaritajn tempojn de ĉerizoj,
kontraŭ tiranojn kaj por la libero,
sia liber': statuo torĉo-porta.

Armas gerilojn kontraŭ diktatoron.
Armas vendante armojn kontraŭ granda monkvanto.
Armas aliaj la tiranon, tiras
grandan profiton el negoco tia.

Kaj la popolo mortas de kugloj ambaŭflankaj.
Kaj jam centoj da miloj da povruloj
mortis en ĉi milito, kiu ne konas finon.
Kvarmilione jam forfuĝis homoj
el barbareco alilanden. Venas
amase nun Eŭropen surirante
ĉiajn inferojn, ĉiajn glaciformojn.
Kaj ĉi farsa Eŭrop' de Germanio
baras al ili l' vojon krurfalĉe, dratbarile.

Post kiam la gerilo iĝis monstro
faranta senkapigojn, detruojn kaj minacojn
al ĉiuj, oni fine ekkonsciis,
ke verŝajne apogi la tiranon
estas la solvo. Kaj neniu hontas.
Kaj la tero ne tremas de la honto.
Kaj cunamo ne ŝprucas de la honto.



**Ajlan**

Pri Siri' mi parolas, sendube vi divenis.
Ĝis nun mi mutis pri la eta *Ajlan*
– ve, kurda *Víctor*, nepo plej amata! –.
Pri tiuj kosmaj honto kaj doloro.
Pri tiom da *Ajlan*'oj sur strand' vizaĝ-al-tere...
Ĉar ties muta bildo movata de la ondoj
semas sombrojn rompantajn mian liron,
ĉi povran oldan liron,
per sia krio transe de blasfemo.

Miguel Fernández

# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen numero grandparte dediĉita al lastatempaj okazaĵoj en Mezoriento, temo bedaŭrinde ne survoje al elĉerpiĝo. Tio tamen ne forgesigu, ke aliloke en la mondo okazas aferoj raportindaj. Interalie, letereto el Argentino atentigas pri la ŝanĝoj en la politika ekvilibro en Suda Ameriko, kion konfirmis kelkajn semajnojn poste la balotrezultoj en Venezuelo.

Aldone al artikoloj pri medioj, beletro, enigmoj kaj SAT-ana aktivado, vi trovos en p. 24 mallongan demandaron, kiu celas kolekti aŭditajn memoraĵojn pri la Unua Mondmilito, kaj ĝia influo al vivo de homoj en la postaj jardekoj. Plej rekte celataj estas la maljunaj kamaradoj, kiuj kreskis en tiuj postmilitaj jaroj, sed la ĝenerala principo validas por ĉiuj, ankaŭ pri aliaj temoj : ege dezirindaj estas tute simplaj raportoj, kiuj rilatigas proprajn unuopajn travivaĵojn kun la pli ĝenerala fluo de la mondaj okazaĵoj.

Fine, se eblas al vi partopreni la venontan SAT-kongreson, bonvolu kiel eble plej rapide aliĝi. Vi tiel faciligos la laboron de la organizantoj. Proponoj pri kontribuoj al la kongresa programo estas aparte bonvenaj. Ja la SAT-kongreso, same kiel Sennaciulo, spegulas la iniciatemon de la partoprenantoj.

Agrablan kaj inspiran legadon deziras al vi :

La Redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Venontaj limdatoj

Sennacieca Revuo 2017: 31a de decembro 2016

Sennaciulo 5-6 (1331-1332): 20a de marto

Sennaciulo 7-8 (1333-1334): 20a de majo

**La Kribejo (frontpaĝa bildo)**

Miaj pentraĵoj ricevas titolon nur post kompleta fino, foje eĉ tre longe poste, ĉar la titoloj rezultas el la bildoj kaj ne la bildoj de iuj antaŭe elpensitaj temaj titoloj. "La Kribejo" ne esceptas tiurilate, kaj omaĝas al amiko mia, K-do Kribo, kiu multe aktivis sine de SAT, inter alie pri la broŝurservo de SAT, ene de la stacidomo de Laroque-Timbaut, kies estro li estis... Sed ne serĉu pli ol fervojan rilaton inter la pentraĵo kaj Kribo, se aliaj detaloj ŝajnus al vi rilati simbole al Kribo aŭ ties aktivado, tio estus pro pura hazardo !

Serĝo Sir'

# Enhavo

Enhavo


1 La Kribejo (frontpaĝa bildo) Serĝo SIR'

2 Ĉiame je la servo de libero Miguel FERNÁNDEZ

## Temdosiero: Mezoriento plu

4 Putin kontestas la blufon de Obama Ian FANTOM

5 La arto de idiota milito Serge HALIMI

8 De Parizo al Bengazi Eric LEE

D-ro Ĉiomprava Dieter ROOKE

9 Deklaro de la Komunista Iniciato (Germanio)

Opinio de Nikolao Gudskov

10 Brita propono bombi Sirion Ian FANTOM

11 Deklaro de diversaj civitanaj asocioj

Komuniko de Laika Agado-Centro en Belgio

12 Deklaro de Mondcivitana Asembleo

Komunikaĵo de la Internacia Federacio de la ligoj de homaj rajtoj

13 Mesaĝo de la agantoj de monda muziko kaj surscenaj spektakloj

Deklaro de Internacia Ligo de Senkonfesiuloj kaj Ateistoj

Komuniko de la sindikata unuiĝo Solidaires (Solidaraj)

14 Palestino: okupado kaj lingvaj konfliktoj Xavi ALCALDE

15 Antisemitismo Kani

16 Antisemitismo (2) Petro LEVI

Ĉu antisemitismo aŭ judofobio? Ĝemil

## Ekologio

17 Akaparado de la terenoj Claudine TOURNIER

18 Klimat-inteligenta agrikulturo: la ĉefa motoro de la Verda Ekonomio

## Laborista kulturo

19 La grandaj urbo Frederiko ENGELS

## SAT-anoj aktivas

20 SATeH en la kultur-depostula Madrido Miguel FERNÁNDEZ

## Vegetara frakcio

22 Pripensoj ĉirkaŭ mortopuno: ĉu aboli ĝin por kulpuloj kaj ĝin konservi por senkulpuloj? Lili' GONDAŬA'

## El la leterkesto

23 Letero de Sen Rodin al Leo Weber

Honto kaj timo en Argentino Nélida Beatriz MONASTERIO

24 Mesaĝo por la Internacia Virina Tago 2016, Hirosima OSIOKA Taeko

Pri la Unua Mondmilito Kani

## El la recenzejo

25 La Ĉevalo de Motizuki Franjo

## Intelekta memdefendo

26 Enigmoj Diana RIŜAR

27 La libero kiun ĝuas la kapitalo dispremi la laboriston Roland PLATTEAU

## Beletro

28 Templo de la Kulpuloj Evgenij GEORGIEV

## El la SAT-administrejo

29 Novaliĝoj

30 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Donacoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***

# Putin kontestas la blufon de Obama

Por la unua fojo depost la Korea Milito, rusaj kaj usonaj militfortoj okupiĝas en rekta milita konflikto. Bonŝance, ambaŭ flankoj tenas sin al mito, ke ili militas kontraŭ komuna malamiko, ekstremaj islamistoj, kiuj batalas sub la nomo ISIS, aŭ ISIL, aŭ *Daeŝo* — t.e., se tio kion multaj el ni nun suspektas esti la vero efektive estas la vero: ke ISIS tute ne estas estrata de islamistoj, sed de por-Okcidentaj fortoj, plej verŝajne kun israelaj spionservoj ĉe la kerno.

ISIS aperis baldaŭ post la voĉdono en la brita parlamento, kiu efektive blokis la registaron en ĝia deziro bombi Sirion. La apero de ISIS ambaŭflanke de la landlimo siria-iraka evidente donos al la Okcidento pretekston bombi Sirion. Tio ankaŭ ĵetis en konfuzon la tutan propagando-entreprenon — eĉ la nomo de la nova islamista forto estis en konfuzo; la terminoj ISIS, ISIL kaj *Daeŝo* ŝajne estis inventitaj de la Okcidento. La ŝirmo donita de tiu artefarite generita milit-nebulo permesos amas-skalan Okcidentan intervenon, kun malmulte da konsidero pri la vero, aŭ respondeco al la publiko.

Tamen la Okcidenta aventuro en Sirio malstabiligadis landon gravegan por la strategiaj interesoj de Rusio, kaj Okcidentaj gvidantoj certe devas esti konstatintaj la riskon implicitan en la celado al lando kiu estas la hejmo de grava rusa militbazo. Kiel mi tiutempe raportis en mia novaĵletero, la rusoj desegnis linion en la sablo en Sirio.

Ankoraŭfoje la reĝimo de *Cameron* en Londono pufas kaj blufas pri la bombado de Sirio, sed ĉifoje la rusoj kontestas ĝian blufon. Se la Okcidento verdiras, tiukaze ili devus bonvenigi rusan helpon en la bombado de ISIS, kaj do la rusoj sinproponis por fari la taskon por ili. Sekvis frosta manpremo inter *Obama* kaj *Putin*. Tiam *Putin* ordonis la bombadon de kontraŭ-registaraj fortoj en Sirio je invito de la internacie agnoskita registaro de Sirio. Tiu interveno estis laŭleĝa; tiu de la Okcidento ne estis. Do kial la Okcidento ne ĝojis pro la rusa interveno? Ĉu povus esti, ke ISIS estas la Okcidento? Ĉu ĝi estas *Mossad*, CIA aŭ MI6 faras malmultan diferencon, ĉar *Mossad* laŭdire havas amasskalan influon en Usono pere de AIPAC kaj la novkonservativuloj, kaj en Britio pere de la Konservativaj Amikoj de Israelo, de kiu 80% de la konservativaj parlamentanoj antaŭ la nacia baloto estis membroj, kaj verŝajne ankoraŭ estas.

Usono akuzas Rusion, ke ĝi celas ne nur ISIS, sed ankaŭ trupojn en Sirio kiuj kontraŭas Prezidenton *Assad*, subtenataj de CIA. Do Usono nun malkaŝe konfesas, ke ĝi subtenas ribelmilitantojn en Sirio. Do eĉ se ISIS ne estas Okcidenta fronto, Usono akuzas Rusion, ke ĝi bombas usone subtenatajn fortojn, kaj tio en si mem signifas, ke la du nukleaj super-potencoj estas en rekta milita konflikto. Sed kiel ni distingu inter usone subtenataj kontraŭ-*Assad*-aj fortoj kaj ISIS? Kiel diris la rusa eksterlanda ministro *Sergej Lavrov*, "Se ĝi aspektas kiel teroristo, se ĝi agas kiel teroristo, se ĝi promenas kiel teroristo, se ĝi batalas kiel teroristo, ĝi estas teroristo, ĉu bone?" [1].

La Okcidento do devas daŭrigi tiun miton pri ISIS, kaj lasi al la rusoj bombi ilin, alie estas ludfino. Jen ĉio kio kuŝas inter la nuna situacio kaj malkaŝa militado inter NATO kaj Rusio. Ŝajnas, ke la rusoj havas similajn pensojn rilate al la okcidentaj fantomaj armeoj. La rusa novaĵagentejo TASS raportis la 5an de oktobro: "La Libera Siria Armeo kaj la modera opozicio ĝenerale restas "fantoma" grupo, diris la rusa eksterlanda ministro *Sergej Lavrov*, aldonante, ke Moskvo vokis al Usono klarigi kio ĝi estas kaj kie ĝi estas bazita" [1].

La vera danĝero nun kuŝas en Turkio, ĉar Turkio estas membro de NATO, kiu najbaras Sirion, kaj havas sian propran translandliman konflikton kun la kurdoj. Nun necesas nur ke Turkio plendu al NATO — ĉu prave, ĉu malprave — pri rusa atako, kaj NATO povus esti entirita en militon kun Rusio sub sia artikolo 5. Turkio ja plendis al Rusio pri du entrudiĝoj en sian aerspacon, sed laŭ rusaj raportoj ili akceptis pardonpeton de Rusio. Usono, minaceme, faris el tio grandan aferon. Tio povus esti nura pufo kaj blufo, sed ĝi alportas nin eĉ pli apude al la rando. Necesas nur unu falsflaga atako por komenci la tutan aferon.

La terorista bomboeksplodo en kurda porpaca amaskunveno en Ankaro sabaton, la dekan de oktobro, povus esti tiaspeca falsflaga atako. Se jes, ĝi povus esti intencita ne por alporti NATOn en atakon al Rusio, sed eble kiel averton al la turka registaro sekvi la linion de Usono kaj Israelo — kvankam ĝi povus esti por sendi mesaĝon al la kurdoj. Tion ĉi mi verkis tuj post kiam mi aŭdis pri la incidento, sed poste la kurdoj akuzis la turkan registaron. En la novaĵraporto de ITV [sendependa televido] oni asertis, ke la stilo de la atako sugestis, ke ISIS povus esti malantaŭ ĝi. Jes ja, ĝi aspektas profesie farita. Se vere ISIS estas la *Israel Secret Intelligence Service* [Israela Sekreta Informkolekta Servo] — t.e. *Mossad* sub alia nomo — kion nun multaj el ni suspektas, do tio povus esti averto de *Mossad* al Turkio, aŭ eĉ provo forigi la turkan registaron en la baldaŭa nacia baloto. Ni esperu,



**Putin kaj Obama**


Sergey Lavrov

ke ordinaraj turkoj tenos sin klarkapaj.

Intertempe, la brita registaro planas leĝaĵon per kiu ĝi malpermesos "neviolentan ekstremismon", specife celante la veromovadon 9-11. Mi prezentis paroladon al nia londona grupo *Keep Talking* la unuan de septembro, montrante, kiel tiu leĝpropono estas bazita sur falsitaj statistikoj kaj falsaj asertoj faritaj de por-registaraj pensokomisionoj. Pritrakti tion estis urĝe, ĉar ĝi signifas, ke grupoj kiaj la nia povus esti malpermesitaj, kaj ke ni povus finfine trovi nin en malliberejo se ni persistos defii al la registaro pri ĝiaj mensogoj. La celo de mia parolado estis kuraĝigi homojn kontraŭi tian tiranecan leĝaĵon kiel ajn ili povas. Post la parolado *James Thring* petis mian helpon fari planojn por lobii la parlamenton surbaze de la materialo kiun mi provizis. *James*, en la nomo de sia organizaĵo *Ministry of Peace* [Ministrejo de Paco], aktive partoprenis en pacnegocoj inter Britio kaj Irako en 2003. Mi opinias, ke en tiu ĉi okazo ni eble atingos iom da sukceso. Tiu afero tamen forprenis min de aliaj aferoj, kaj tiu ĉi novaĵletero estis plue prokrastita pro tio. Ĝi estis preskaŭ preta fine de septembro, sed nun, aŭdinte pri la evoluiĝanta situacio en Turkio, mi decidis verki tiun ĉi aldonan enkondukon kaj dissendi la novaĵleteron laŭeble plej rapide. Ĝi inkluzivas eksterordinarajn detalojn por eksterordinara situacio.

Ian Fantom

*En Aktualaĵ-raporto de* Keep Talking *por majo ĝis oktobro 2015*

[1] http://kfor.com/2015/10/01/russias-lavrov-on-syria-targets-if-it-looks-like-a-terrorist-walks-like-a-terrorist/

# La arto de idiota milito

**La mortigoj de la 13-a de novembro en Parizo, konfesataj de la Organizaĵo de la Islama Ŝtato (OIŜ), sekvigis intensigon de la okcidenta engaĝiĝo en la Proksim-Oriento. Tiu mondregiono ŝajnas esti kondamnita al armitaj intervenoj. Tamen, kvankam la milita detruo de la OIŜ en Sirio kaj Irako estas celo pri kiu dekoj da eksteraj landoj — de Usono ĝis Ruslando, de Irano ĝis Turkujo — ŝajnas interkonsenti, ĉio cetera disigas ilin ...**

"Mi ne estas kontraŭ ĉiuj militoj. Tio, kion mi kontraŭas, estas stulta milito, ne pripensita milito, milito bazita ne sur la racio, sed sur la kolero." Tiel parolis, la 2-an de oktobro 2002, apenaŭ konata delegito de la federacia ŝtato Ilinojso, *Barack Obama*. La kolero pro la atencoj de la 11-a de septembro 2001 en Usono ne malfortiĝis kaj la prezidanto *George W. Bush* decidis direkti ĝin ne al Saud-Arabujo, de kie la plej multaj membroj de la Al-Kaido-taĉmentoj venis, sed al Irako, kiun li ses monatojn poste atakis. La amaskomunikiloj volis la militon; la plej multaj demokrataj senatanoj, inter ili s-ino *Hillary Clinton*, aliĝis al tio. Kaj la invado al Irako kreis la ĥaoson kiu servis kiel bredejo por la Organizaĵo de la Islama Ŝtato (OIŜ).

La mortigoj de la 13-a de novembro en Parizo nun komencas efiki favore al la du ĉefaj celoj de la OIŜ. La unua estas la starigo de koalicio de "apostatoj", de "malfideluloj", de "ŝijaistaj renegatoj" kiuj batalos kontraŭ ĝi, unue en Irako kaj Sirio, poste en Libio. Ĝia dua projekto estas instigi la plej multajn okcidentanojn kredi ke iliaj islamaj samlandanoj povus esti "kvina kolono" en la ombro, "interna malamiko" en la servo de la mortigistoj.


Pierre-Jean Luizard

Milito kaj timo: eĉ apokalipsa celo enhavas parton de racieco. La ĝihadistoj kalkulis, ke la "krucmilitistoj" kaj la "idolanoj" ja povas bombi ("frapi") siriajn urbojn, regi irakajn provincojn, sed ili neniam sukcesos por la daŭro okupi araban teritorion. La OIŜ cetere kalkulas, ke ĝiaj eŭropaj atencoj incitos la malfidon al la okcidentaj islamanoj kaj ĝeneraligos la policajn disponojn kontraŭ ili. Tio ege altigos ilian venĝemon tiom, ke kelkaj el ili aliĝos al la batalantoj de la kalifejo. Tiuj estos ekstreme malmultaj, certe, sed la janiĉaroj de ĝihadismo ne celas gajni elektojn. Envere, se kontraŭislama partio gajnas ilin, la realigo de ilia projekto des pli rapide progresas.

"Francujo estas en milito", tuj anoncis la prezidanto *François Hollande*, parolante al la parlamentanoj kunvenintaj en Kongreso la 16-an de novembro. La prezidanto jam delonge serĉas eblecon engaĝiĝi ĉe la fronto en Sirio kaj eĉ provas pli partoprenigi Usonon. Sed unu el la strangaj flankoj de tiu ĉi afero konsistas en tio, ke s-ro *Hollande* volas hodiaŭ militi kontraŭ la OIŜ en Sirio, dum antaŭ du jaroj, kun la sama militema obstino, li provis konvinki Vaŝingtonon "puni" la reĝimon de s-ro *Baŝar Al-Assad*.

Ĉu s-ro *Obama* tre longe kontraŭos la "stultan militon", kiun la franca prezidanto postulas? La premo sur *Obama* estas des pli forta ke la OIŜ sekvas la saman planon kiel Parizo ... Kiel la esploristo *Pierre-Jean Luizar* antaŭ kelkaj monatoj klarigis, ĉio en unua etapo okazis "kvazaŭ la Islama Ŝtato estus zorge listiginta ĉion kion povas abomeni la okcidentaj publikaj opinioj: atenco al la rajtoj de malplimultoj, al la rajtoj de la virinoj, speciale per trudata edzinigo,

ekzekutado de samseksemuloj, restarigo de sklavismo, sen paroli pri la scenoj de senkapigo kaj de amasa ekzekutado”. [1] Kiam la elmontro de tiu makabra katalogo ne plu aŭ ne tute sufiĉis, la OIŜ decidis mortigi usonan ostaĝon kaj zorge disvastigi la bildojn de la sceno; poste ĝi organizis plurajn mortigajn pafadojn en Parizo. La rebato de la “krucmilitistoj” estis nun urĝa.

Efektive, ŝtatestro estas preskaŭ devigata reagi al tiaj impresaj agoj. La politika premo instigas lin tuj anonci ion, inkluzive kion ajn. Ordoni la detruon de hangaro, de municideponejo, bombadon de urbo. Elmontri sian decidemon. Promesi novajn leĝojn ankoraŭ pli severajn, draŝi la “munkenanojn” [2]. Spici siajn frazojn per militismaj terminoj, paroli pri “sango”, kaj aserti, ke oni estos “senkompata”. Rikolti starajn aplaŭdojn, post dek pliajn poentojn en la opini-enketoj. Fine ĉio ĉi ofte montriĝas malracia, “stulta”; sed nur kelkajn monatojn poste. Kaj la kaptilo de reciproka superado estas pli kaj pli nerezistebla, speciale pri la informado konstanta, anhelanta, freneza, kiam ŝajnas, ke nenia ago, nenia deklaro povas resti sen tuja rebato.

En 1991, dum la Golf-milito, la usonaj falkoj riproĉis al la prezidanto *George H. Bush* ke li ne ordonis al la trupoj liberigintaj Kuvajton plu marŝi ĝis Bagdado. Kvar jarojn poste, la ĉefo de la tiama usona ĉefstabo, la generalo *Colin Powell*, pravigis ilian reteniĝemon, tute relativan: “Geopolitike, la koalicio, ĉefe la arabaj ŝtatoj, ne volis ke Irako invadiĝu kaj dispeciĝu. [...] Irako fragmentita en sunaistaj, ŝijaistaj kaj kurdaj politikaj entoj ne kontribuintus al la stabileco, kiun ni serĉis en la Proksim-Oriento. La sola rimedo eviti tian sekvon estintus konkero kaj okupado de lando de 20 milionoj da loĝantoj, fare de Usono. [...] Aliflanke, estus naiva esperi ke, se *Saddam* estus



**François Hollande**

faligita, iraka *Thomas Jefferson* anstataŭos lin. Ni verŝajne ricevintus ian *Saddam* kun alia nomo.” [3] En 2003, s-ro *George W. Bush* “finis la militan laboron” de sia patro. La novkonservativuloj tiam salutis novan *Churchill*, la demokration, la kuraĝon. Kaj la generalo *Powell* certe forgesis relegi sin mem, ĉar li vidis siajn timojn realigitaj de prezidanto, kiun li ĉi-foje servis kiel ŝtatsekretario ...

Oni ofte riproĉis al s-ro *George W. Bush* lian infanecan kaj kriman simplismon, lian “militon kontraŭ la teroro”. Ŝajnas, ke li trovis heredantojn en Parizo. “Ni revenu al simplaj aferoj — ĵus klarigis s-ro *Laurent Fabius*, la franca ministro pri eksterlandaj aferoj, kun sia talento de bazlerneja instruisto specialiĝinta pri instruado de etaj infanoj, kiuj ni estas — Daeŝo [4], tio estas monstroj, sed ili estas 30 000. Se ĉiuj landoj de la mondo kune ne kapablas elradikigi 30 000 homojn, kiuj estas monstroj, tiam en tiu momento oni povas jam nenion kompreni.” [5] Ni do provu klarigi al li.

Ni unue uzu la metaforon pri la fiŝoj en la akvo: la “30 000 monstroj” disponas pri multaj apogoj en la sunaistaj zonoj de Irako kaj de Sirio; la armeoj, kiujn ili alfrontas, estas efektive ofte perceptataj kiel instrumentoj de ŝijaistaj diktatorecoj, ankaŭ respondecaj pri multaj masakroj. Pro tio la OIŜ akaparis plurajn urbojn, kelkfoje sen batali, kiam la soldatoj, kiuj gardis ilin, forĵetis siajn uniformojn kaj siajn armilojn antaŭ ol forkuri. Usono provis financi la trejnadon kaj ekipadon de pli ol 4 000 “moderaj” siriaj batalantoj; nu, laŭ la usonanoj mem, nur “kvar aŭ kvin” estas batalpretaj. La kosto por ili: po pluraj milionoj da dolaroj ... En Mosulo, 30 000 irakaj soldatoj estis venkitaj de 1.000 batalantoj de la OIŜ, kiuj akaparis pli ol 2 000 kirasitajn veturilojn kaj centojn da milionoj da dolaroj, kiuj atendis ilin en la kofroj de la bankoj. En *Ramadi* la ĝihadistoj ankaŭ venkis la irakajn fortojn dudekkvinoble pli multnombrajn. La siriaj soldatoj estas elĉerpitaj pro kvar jaroj da milito. Kaj la kurdoj ne volas morti por teritorioj, kiujn ili ne postulas. “En la realo — observas *Luizard* — la Islama Ŝtato estas forta nur pro la malforteco de ĝiaj kontraŭuloj kaj ĝi prosperas sur la ruinoj de disfalantaj institucioj.” [6]

Sama situacio en Libio. Sub la efiko de emocio kaj sub la egido de



**Bernard-Henri Lévy**

sturmduopo konsistanta el s-ro *Nicolas Sarkozy* kaj *Bernard-Henri Lévy*, Francujo forte kontribuis al faligo de *Muamar Kadhafi*. Ĝi imagis, ke ankaŭ tie sufiĉas lasi diktatoron linĉiĝi por ke lia forpaso nasku okcidentecan liberalan demokration. Rezulto: la ŝtato estas dispeciĝinta kaj la OIŜ regas plurajn urbojn de la lando, de kiu ĝi organizas atencojn kontraŭ la najbara Tunizio. Tiom ke la franca defend-ministro koncedas: “Libio multe zorgigas min. Daeŝo instaliĝis tie kaj profitas el la internaj alfrontiĝoj inter libianoj.” Tamen, kalkulas li, “se oni kunigas la fortojn de Tobruko kaj de Tripolo, Daeŝo ne plu ekzistas” [7] ... La problemo estis tamen jam solvita antaŭ tri jaroj, kiam *Bernard-Henri Lévy* klarigis: “Libio, male al tio, kion la *Kasandr*-uloj anoncis, ne disfalis en tri konfederaciajn entojn. [...] La triba leĝo ne regis super la sento de nacia unueco. [...] Nun la fakto estas jena: Libio, kompare kun Tunizio kaj Egiptujo, aspektas kiel sukcesinta printempo — kaj tiuj, kiuj helpis ĝin povas fieri pri sia faro.” [8] Tiu fiero estas tute prava: krom *Bernard Guetta*, kiu ĉiumatene en la radio *France Inter* disvastigas la vidpunkton de la franca ministrejo pri eksterlandaj aferoj, [9] neniu pli facile mirrakontas ol li.

La franca prezidanto nun deziras “grandan kaj unuecan koalicion” kontraŭ la OIŜ. Ĝi necese inkludu la sirian prezidanton. Nu, tiu jam respondas: “Vi ne povas batali kontraŭ Daeŝo kaj samtempe resti aliancano kun Kataro kaj Saud-Arabujo, kiuj armas la teroristojn.” [10] La rusa prezidanto siavice taksas ke Turkujo, alia supozata membro de la kontraŭĝihadista alianco, “ponardis en la dorson” de lia lando, la 24-an de novembro, per depafo de unu el ĝiaj milit-aviadiloj. Resume, ekde kiam la milito estus gajnita de la diversspeca koalicio, kiun Parizo provas estigi, la

demando pri "la tago poste" leviĝus en kondiĉoj ankoraŭ pli danĝeraj ol en Afganujo, en Irako kaj en Libio. En Usono, la novkonservativuloj jam forgesis (ĉu same kiel la franca prezidanto?) ĉiujn ĉi fiaskojn. Tiom ke ili postulas la sendon de 50 000 usonaj soldatoj en la zonojn okupatajn de la OIŜ. [11]

En la lasta numero de la revuo *Foreign Affairs*, du universitataj specialistoj pri la Proksim-Oriento, *Steven Jones* kaj *Jonathan Stevenson*, komencas inventari la kondiĉojn por daŭrema okcidenta milita sukceso en la teritorio, kiun la OIŜ aktuale okupas: apogo de la usona publika opinio, sendo de granda nombro da specialistoj pri rekonstruado, kono de la lokaj socioj, surloka ĉeesto en Irako kaj Sirio de klientoj aŭ de aliancanoj. Poste ili konkludas: "Ĉio ĉi ŝajnas esti bone konata, ĉar temas ĝuste pri la listo de aferoj, kiujn Vaŝingtono ne kapablis realigi dum siaj du lastaj grandaj intervenoj en la Proksim-Oriento: la invado de Irako en 2003 kaj la aerkampanjo kontraŭ Libio en 2011. Por diri tion simple, Usono verŝajne perdus kroman militon en la Proksim-Oriento pro la samaj kialoj pro kiuj ĝi perdis la du antaŭajn." [12]

Francujo, jam peze engaĝita en Afriko, ne estas destinita por gajni "militon" en Proksim-Oriento. La fakto ke la OIŜ deziras logi ĝin en tiun kaptilon ne devigas s-ron *Hollande* urĝe eniri ĝin kaj en ĝin kuntreni koalicion de landoj multe pli malriskemaj. La terorismo mortigas civilulojn; la milito ankaŭ. La intensigo de la okcidentaj bombadoj en Irako kaj en Sirio, kiu kreos same multajn ĝihadistajn batalantojn kiom ĝi detruas, ne restarigos la integrecon de tiuj ŝtatoj nek la legitimecon de iliaj registaroj en la okuloj de iliaj loĝantaroj. Daŭrema solvo dependos de la popoloj de la regiono, ne de la iamaj koloniaj potencoj, nek de Usono, kiun malkvalifikas samtempe ĝia subteno al la plej fiaj israelaj politikoj kaj la katastrofa bilanco de ĝia milita aventurismo — katastrofa ankaŭ laŭ ĝia propra vidpunkto: per sia invado de Irako en 2003, post kiam ĝi subtenis dum ok jaroj la irakan prezidanton *Saddam Hussein* en lia milito kontraŭ Irano (pli ol miliono da mortintoj), ĝi transformis tiun landon en aliancanon de Teherano ... Fine, ŝtatoj, kiuj vendas armilojn al la petrol-diktatoraj ŝtatoj de la Golfo, kiuj disvastigis la ĝihadisman salafismon, ne estas kvalifikitaj por paroli pri paco nek por instrui al la araboj la virtojn de plurisma demokratio.

"Kiam ili agas en stabilaj ŝtatoj, kun stabilaj reĝimoj kaj sen la materia subteno de parto de la loĝantaro — observis la historiisto *Eric Hobsbawm* en 2007 — la teroristaj grupetoj estas problemo polica kaj ne problemo milita. [...] Estas kompreneble, ke tiaj movadoj tre nervozigas la loĝantaron, precipe en la okcidentaj grandaj urboj, ĉefe kiam la registaro kaj la amasinformiloj unuiĝas por krei etoson de timo." [13]

Tiu etoso de timo kaj la ripetata kondamno de la "anĝelismo" ebligas kovri la voĉon de tiuj, kiuj rifuzas la senfinan amasigon de senutilaj subpremaj dispozicioj kaj danĝeraj por la publikaj liberecoj. Disponoj kun gusto de fremdul-malamo, ekzemple al ili aldoniĝas la ebleco forpreni la ŝtatanecon de iuj duŝtatanoj, laŭ la postulo de la Nacia Fronto. Kaj ne nur la urĝostato estis preskaŭ unuanime voĉdonita de la timigitaj parlamentanoj, sed la ĉefministro ankaŭ petis ilin ne submeti al la Konstitucia Konsilantaro la laŭleĝe dubindajn disponojn, kiujn li submetis al ili.

En 2002, s-ro *Obama* direktis la sekvajn vortojn al tiu, kiun li estis anstataŭonta: "Ĉu vi volas batali, prezidanto *Bush*? Ni batalu por ke la armilvendistoj en nia propra lando ĉesu nutri la sennombrajn militojn kiuj furiozas en la mondo. Ni batalu por ke niaj tiel nomataj aliancanoj en la Proksim-Oriento ĉesu subpremi sian popolon kaj bridi la opozicion kaj toleri la korupton kaj la malegalecon tiom ke iliaj junuloj grandiĝas sen edukado, sen perspektivoj de estonteco, sen espero, fariĝante facilaj rekrutoj por la teroristaj ĉeloj." S-ro *Obama* ne sekvis la konsilojn kiujn li donis. La ceteraj ŝtatestroj ankaŭ ne. Domaĝe. La atencoj de la OIŜ kaj la katastrofa eksterlanda politiko de Francujo kondukis al nova "milito". Sole milita, kaj do anticipe perdita.

SERGE HALIMI

*Tradukita de Vilhelmo Lutermano*
*1-a decembro 2015*
*Fonto: http://eo.mondediplo.com/article2299*



**Eric Hobsbawm**


[1] *Pierre-Jean Luizard, Le Piège Daech. L'Etat islamique ou le retour de l'histoire, La Découverte*, Parizo, 2015.

[2] Politikistoj, kiuj provas ĉiapreze kompromisi kun la ekstremistoj por konservi la pacon, laŭ la modelo de la angla kaj franca registaro kun Hitlero en Munkeno, kie ili siatempe decidis transdoni la sudetgermanan parton de Ĉeĥoslovakio al la hitlera Germanujo. (Noto de V. Lutermano)

[3] *Colin Powell, A Soldier's Way. An Autobiography, Hutchinson*, Londono, 1995.

[4] El la araba akronimo داعش (en aliaj lingvoj transskribita per *Daesh*, *Daech*, *Daesch*...)

[5] *France Inter*, 19-an de novembro 2015.

[6] *Pierre-Jean Luizard*, v. c.

[7] *Europe 1*, 22-an de novembro 2014.

[8] *Le Point*, 6-an de decembro 2012. En *Le Point* de la 16-a de novembro 2015, *Bernard-Henri Lévy* proponis sian "Milito, uzindiko" por Sirio ...

[9] "La franca prezidanto proksimiĝis al Ruslando nur post kiam ĝi komplete reviziis sian politikon pri Sirio", asertis *Bernard Guetta* la 19-an de novembro 2015. Vd cetere la artikolon de *Pierre Rimbert*, "*Le théorème de Guetta*", *Le Monde diplomatique*, novembro 2008.

[10] *Valeurs actuelles*, Parizo, 19-an de novembro 2015.

[11] Kp *Robert Kagan*, "*The crisis of world order*", *The Wall Street Journal*, Novjorko, la 21-an de novembro 2015.

[12] *Steven Simon* kaj *Jonathan Stevenson*, "*Why Washington's Middle East pullback makes sense*", *Foreign Affairs*, Novjorko, novembro-decembro 2015.

[13] *Eric Hobsbawm, L'Empire, la Démocratie, le Terrorisme, André Versaille — Le Monde diplomatique*, Bruselo-Parizo, 2009.

# De Parizo al Bengazi

La teroristaj atencoj en Parizo konsternis la mondon, kaj la sindikata movado elsendis plurajn fortajn deklaraciojn, kiujn vi povas legi sur la unua paĝo de *LabourStart* [1]. Tiuj ĉi enhavas deklarojn de la Internacia Sindikata Konfederacio, de tutmondaj sindikatoj, kaj naciaj sindikataj centraloj. Samtempe, ni ne devas forgesi, ke membroj de niaj sindikatoj ofte estas ĉe avangardo en la lukto kontraŭ terorismo. Unu el ili estas *Nermin Al-Ŝarif*, gvidantino de la Unio de Dokistoj kaj Maristoj de Libio.

*Nermin Al-Ŝarif* estas pasia kaj decidema internaciistino, kiu luktas favore al la rajtoj de virinoj en la araba mondo, kaj en *Qatar Airways* por la rajtoj de dokistoj kaj maristoj, kiujn ŝi reprezentas. Ŝi plu plenumis pli kaj pli danĝeran agadon, spite enlandan militon en naftoriĉa Libio. Dimanĉon 8an de novembro, *Nermin*, gvidantino de la Unio de Dokistoj kaj Maristoj de Libio, estis celo de pafoj, dum ŝi kondukis veturilon apud *Bengazi*. Ŝi jam eliris el la malsanulejo kaj resaniĝas. Tio estas la dua atenco kontraŭ ŝia vivo, post la murdo de tri aliaj famkonataj aktivulinoj pri virinaj rajtoj.



**Nermin Al-Sharif**

Petataj de la Internacia Federacio de la Laboristoj de Transportoj, ni lanĉis retkampanjon [2], postulante de la libia registaro, ke ĝi protektadu la sindikatanojn kaj la aktivulojn pri homaj rajtoj. Bonvolu dediĉi momenton por subteni la kampanjon. Subskribu kaj disvastigu la aferon. Dankon.

Eric Lee

[1] http://www.labourstart.org/news/

[2] http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2884

# D-ro Ĉiomprava

**Demandas bonkora Satano (Esperantisto) la d-ron Ĉiomprava:**

Agreso, perforto, milito, kial ĉi tio ekzistas en la mondo? Ĉu ĉion ĉi ni neniam povus elimini aŭ ĉu vi opinias la karakteron de homo ŝanĝebla?

**Respondas sagace nia d-ro Ĉiomprava:**

Nek, nek. Mi opinias, demandojn pri la karaktero de homo ne respondeblaj. Tiaj demandoj kondukas al sakstrato sen elirejo. Tion oni nomas "ontologio" [1] sen rilato kun la vera historio. En tia tradicio de tia "ontologio" oni ĝenerale distingas la homon disde animaloj. Sciencistoj atribuas al homo ekskluzivan posedon de lingvo, kapablon uzi ilaron, kulturon, historiecon. Ĉio ĉi sendube estas konstatebla kaj esplorebla. Sed post "scienca" komparado kun la socia vivo de formikoj, la komunikado de delfenoj, la heredita inteligento de ratoj, kaj lerta aplikado de iloj far korvoj – malaperas preskaŭ ĉiaj diferencoj inter homo kaj animalo.

La vera karaktero de homo ne estas paca, altruisma, sociema – nek homo homas lupe. Tia divido ne ekzistas – ne ekzistas la dilemo inter ideologio de libereco kaj de puno. Nuntempe plej furoras en sciencaj rondoj la t.n. "esploro de feliĉo". Per eksperimentoj en kartludoj estas ŝajne demonstrebla la abnegacia konduto de homo. Sed kiu garantias la eksperimentojn validaj en normalaj cirkonstancoj? Ĉu vere ili pruvas la realan naturon de homo?

En multaj artikoloj oni rakontas fabelojn pri la idilia kunvivado de simioj – antaŭ ne longe pri la bonoboj – sed bedaŭrinde la ĉimpanzoj montriĝis ege agresemaj! La rakontoj pri la pacema karaktero de prahomoj sur polineziaj insuloj aŭ en fora Ŝtonepoko same montriĝis nur "bela sonĝo de homaro"! Sed tia konkludo ne signifas la bestian econ de homo – la homo ne naskiĝis fia aŭ malbona. Sobra historia konsidero nur pruvas, ke homo kondutas treege malsimile, laŭ historiaj cirkonstancoj, laŭ diversaj kondiĉoj, homo pacas kaj militas – eĉ samtempe.

Ĉion ĉi mi nomas reala kaj sobra pensmaniero. Ne ekzistas kaŭzo por espero – nek por despero.

Dieter Rooke

*Surbaze de artikolo el* Der Bund *(4-11-2015)*

[1] Parto de metafiziko.

# Komunista Iniciato (KI) pri la atencoj en Parizo

La KI kondamnas la barbaran atencon en Parizo, ĉe kiu pli ol 130 homoj estis murditaj kaj pli ol 350 vunditaj. Nia kunsento kaj nia solidareco estas por la viktimoj. Samtempe la KI kondamnas ankaŭ la spiritajn kaŭzintojn de tiu antenco. Dum jardekoj ĝihadistaj teroristoj estis de okcidentaj ŝtatoj financataj kaj armataj, por faligi ĝenajn registarojn. Ekde la jaro 2011 okazas en Sirio ĉiutage tiaj atakoj, sen ke la okcidenta komunikilaro notis tion. La paraleloj al la 11-a de septembro 2001 fariĝas klaraj. Pli ol 3000 homoj mortis en 2001 ĉe la atencoj en Usono, kiuj estis supozeble faritaj de Al-Kajda-teroristoj. Ankaŭ tiu terorista grupo estis antaŭe armita de Usono kontraŭ la porsovetia afgana registaro, por alkonduki reĝimŝanĝon.

La UCK-batalantoj aplikitaj kontraŭ Jugoslavio aŭ la teror-milicoj en Libio servis la saman celon.

En tagoj kiel tiu ĉi ankaŭ klariĝas la cinika logiko de la komunikilaj ideologiistoj. Dum la IŜ- kaj Al-Kajda-marionetoj murdis per okcidentaj armiloj en Sirio kaj en Irako, tio apenaŭ meritis mencion en la raportado de la okcidentaj komunikiloj. Ankaŭ kiam en Ukrainujo dekoj da homoj estis vive bruligitaj de faŝistoj en la sindikata domo, la okcidentaj komunikiloj apenaŭ interesiĝis pri tio. Ĝenerale la konsterno estas granda nur kiam eblas propagande uzi la okazaĵon, kiel nun ĉe la teruraj murdoj en Parizo.

Oni devas timi, ke tiuj ĉi atencoj estos denove uzataj kiel preteksto por pravigi kroman superrigardon kaj spionadon de la loĝantaro kaj prepari kromajn atak-militojn. Faŝistaj grupoj kiel la Nacia Fronto en Francujo aŭ PEGIDA en Germanujo same profitos de la per tio pli akrigita histerio kontraŭ islamo.

La faŝismo kiel rezervo de la imperiismo uzas tiujn sentojn por agi ĝuste kontraŭ tiuj, kiuj antaŭ tiu teroro devis fuĝi al Eŭropo. Ĉe tio devus esti klara, ke malantaŭ la IŜ, Al-Kajda aŭ Al-Nusra kaj similaj grupoj staras ĉiam la imperiismo mem. Ankaŭ la germana imperiismo estas rekte aŭ malrekte tra siaj aliancanoj Turkujo, Saud-Arabujo, Kataro ktp. ligita kun ili. Kun ĉia indigno oni ne forgesu, ke la ĝihadistaj teroristoj estas daŭre marionetoj de la okcidentaj imperiistoj. Sed kiu volas vere neniigi la ĝihadistan teroron, tiu devas ankaŭ disbati la imperiismon!

Dum la registaro ĵus dekretis la urĝostaton, nepre necesas fortigi la rimedojn de la polico kaj de la justico. La ŝtato devas por la daŭro trovi la taŭgajn rimedojn por garantii la sekurecon de ĉiuj.

Tiu alineo estas maltrankviliga. La teroratako ne estis iu spontana atako de stultaj frenezuloj, sed ege kompleksa kaj detale planita atako de profesiuloj. Evidente ili antaŭvidis la konsekvencojn de tia atako. La antaŭvideblaj konsekvencoj estas:

1. Militserva transpreno de Francio.
2. Preteksto bombi Sirion, almenaŭ por la brita registaro, kiu serĉas tian pretekston.
3. Preteksto por subpremi homojn kiuj suspektas ŝtatan komplicon en antaŭaj teroratakoj.

Ĝuste tio okazas. Oni devas do pensi, ke tio verŝajne estis ĝuste tio, kion la teroristoj volis inciti.

*Tradukita de Vilhelmo Lutermano*

Kvankam mi ĝenerale tute ne samopinias kun tiu stalinista organizaĵo K.I., mi trovas tiun tekston tiom interesa, ke mi Esperantigis ĝin el la germana" (NdT).

Originala versio:

http://kommunistische-initiative.de/index.php/nachrichten/international/1968-erklaerung-der-kommunistischen-initiative-zu-den-anschlaegen-in-paris.

# Opinio de Nikolao Gudskov

Du semajnojn antaŭ la pariza atenco la samaj teroristoj eksplodigis la rusan aviadilon, en kiu pereis duoble pli da homoj ol en Parizo... Mi ne rimarkis simile amasan reagon...

Sed la kaŭzo estis sama – imperiisma politiko en Sirio, kie eksplodas bomboj kaj pereas homoj, kiuj pli frue tute ne intencis iel tuŝi iujn eŭropanojn. Sed nun – jes ja.

Akcelo de la "kontraŭterorismo" povas konduki nur al kresko de terorismo. Kaj rapida dekstriĝo (kaj fine – totalismiĝo) de ĉiuj koncernataj landoj.

Nikolao Gudskov



# Brita propono bombi Sirion



**David Cameron**

Multaj homoj en Britio nuntempe protestas kontraŭ la registaran proponon bombi Sirion, sed la argumentado de *David Cameron* estas BAZITA SUR TROMPO.

"Ĉiu militado baziĝas sur trompado", skribis *Sun Tsu* en sia klasika libro La Arto Militi, en la Taŭ-Dinastio en Ĉinio. La trompado pri la kazo por bombadi Sirion promesas fariĝi tiom granda skandalo kiel la amasdetruaj armiloj de *Tony Blair* kiel preteksto bombi Irakon.

Kiu estas ISIS [Islama Ŝtato en Irako kaj Sirio]? Kiel povus tiom amasa milita forto subite esti aperinta el nenio kaj transpreninta grandegajn teritoriojn en la Mezoriento kaj Norda Afriko? Kial ni neniam vidas ajnan pruvaĵon de malantaŭ la malamika fronto? Kial nia registaro estas tiom evitema? Sole tiuj konsideroj devus diri al ni, ke ISIS povus esti Okcidenta kreaĵo, starigita por provizi pretekston por bombi Sirion post la registara malvenko en la malsupra ĉambro de la parlamento antaŭ du jaroj. Neniu lando devus iam ajn ekmiliti sen klara scio de la malamiko kaj sen la konsento de la popolo.

La rusa eksterlanda ministro *Sergej Lavrov* eĉ pridubis la ekziston de la Libera Siria Armeo. "Rusio volonte kunordigus kun la "fantoma" grupo, sed neniu ŝajnas kapabla trovi ilin; krom eble en CNN", raportis TASS [1].

*Vladimir Putin* diris al usonaj ĵurnalistoj ke ISIS konsistas el dungosoldatoj pagataj de la Okcidento [2]. Ĉu oni ne atendus, ke tio estus disvastigita sur ĉiuj front-paĝoj en la nacia gazetaro de la Okcidento? Kaj se oni ne kredas lin, ĉu oni ne atendus, ke la gazetaro uzus tion kontraŭ lin kiel Publikan Malamikon Numero Unu?

*Zero Hedge* provizis jenan raporton: *Secret Pentagon Report Reveals US "Created" ISIS As A "Tool" To Overthrow Syria's President Assad* [Sekreta *Pentagon*-raporto malkaŝas, ke Usono "kreis" ISIS kiel "ilon" por supervenki la sirian Prezidenton *Assad*] [3].

Eble povus ŝoki multajn homojn konstati, ke la parizaj atakoj eble ne estas tio, kio ili ŝajnis esti. Jes, tiaj aferoj okazis antaŭe. Mi ĵus ricevis tiun ĉi komenton:


"La atakoj en Parizo, Bejruto kaj Tunizo evidentigas spuron de la « strategio de tensio », pri kiu pioniris la sekretaj Gladio-armeoj de NATO en la 1960aj kaj 1970aj jaroj, kiuj nun ŝajne revenis al aktiva servo. La libro de *Richard Cottrell* pri tiu aktuala temo estas nun en sia dua eldono: *Gladio: NATO's Dagger at the Heart of Europe* [Gladio: Ponardo de NATO ĉe la koro de Eŭropo]. Estas tute strange rigardi aktualajn eventojn kaj vidi la samajn spurojn de teroro por teni la publikon en timo kaj preta akcepti ajnajn limigojn aŭ registaran agon sendemande, pelate de la korporaciaj amaskomunikiloj. *Richard Cottrell* estas iama konservativa eŭropa parlamentano, kio donas al ni ion pripensindan."

Ian Fantom

[1] http://russia-insider.com/en/politics/lavrov-show-us-your-fake-free-syrian-army/ri10286

[2] https://www.youtube.com/watch?v=55vtseMX1H8

[3] http://www.zerohedge.com/users/tyler-durden




**ISIS-Flago**

# Deklaro de diversaj civitanaj asocioj

**Ni ne cedos!**

Tiuj kiuj, nome de *Daech*, trudis al Parizo kaj en *Saint-Denis*, momenton de absoluta malhumaneco ne cedigos nin. Nenio povas pravigi tiujn murdojn, nek ĉi tie nek aliloke. Ĉiuj viktimoj ĉar ni apartenas al la sama homaro. Nia solidareco al iliaj familioj estas totala. Tiu krimo estas gravega sed nia reago estos konvena plu vivante libere kaj fratece.

Ni ne estu naivaj: ni scias ke tiuj teroristaj fiagoj necesigas respondojn kongruajn kun la nivelo de danĝero kiun ili signifas. Ni scias ankaŭ ke la rolo de la polico kaj de la justico estas esenca por protekti nian liberon. Sed tio ne malhelpu nin pripensi la respondojn kiujn nia socio alportu al tiuj agoj, kaj analizi tiujn jam deciditajn.

Ja la demokratio estas atencita kiam la Parlamento estas kunvokita por subite debati, sub la premo de la emocio kaj de la demagogio de politikaj responsantoj kiuj flegas ĉiesan timon.

Post la pludaŭrigo de la urĝo-stato kaj grandigo de la polico-povoj, aliaj decidoj estas plu anoncitaj de la prezidento de la Respubliko. Ŝajnas esence rememorigi ke nenio povas eligi nin el la Rajto-stato kaj senigi nin je niaj liberoj. La urĝo-stato ne povas fariĝi konstanta, kaj kondiĉoj de ĝia starigo ne povas malutili al la socia demokrateco, al la ĝuo de la civitaneco kaj al la publika debato.

De 1986, multiĝas la leĝoj donantaj pli da povo al la polico, organizante justicon de arbitro kaj limigante nian liberon, pretekste de batalo kontraŭ la terorismo. La decido de aliaj leĝaj aranĝoj, eĉ se konstituciaj, necesigas meti la demandon pri ilia efikeco kaj pri la plia trafo kontraŭ la liberecoj, kiun ili konstituas. Antaŭ ol modifi la leĝon, donante kromajn povojn al la Ŝtato, necesas ke tiu ĉi sin demandu pri tio kio ne ebligis eviti tian abomenindaĵon. La respondo de la aŭtoritatoj sin montras milita, sed ĝi ne estas asekuro de sekureco kaj neniel garantias la respekton de niaj liberoj.

Celi senigon de nacieco eĉ de tiuj franc-naskitaj, estas plian fojon sendi mesaĝon pri disigita Francio. La silento de la prezidento de la Respubliko, okaze de la kunsido de la Parlamento, koncerne la necesan engaĝiĝon de la Ŝtato favore al rajto-egaleco, al la sociala justeco, la disvolviĝon de la publikaj servoj, kontraŭ ĉiuj diskriminacioj kaj kontraŭ ĉiuj elmontroj de rasismo drame kreskigas la senton de ekskludo kiun spertas parto de nia popolo. Ĝi tiel nutras la kreskantan stigmatizadon kiu stompas nian deziron kunvivi.

Ni volas ke tiuj dramaj okazaĵoj, male estu okazo konstrui alian vojon ol tiun proponitan. Vojon kiu rifuzas akuz-montri nekulpantojn, kaj rifuzas ke Francio estos en stato de milito kontraŭ si mem. Vojon kiu provizas la pacon kaj la egalecon de la rajtoj kaj engaĝiĝas favore al Francio solidara, malfermita al la aliuloj, gastigema, liberema kaj frateca. Por niaj liberoj, por socio en kiu la frateco plenrajtas, ni ne cedos antaŭ la timo en kiun volas nin peli tiuj por kiuj la morto estas vivocelo. Ni alvokas la homojn de tiu lando pluresti solidaraj kaj kontraŭi ĉiujn formojn de rasismo. Ni alvokas ankaŭ al la defendo de la liberoj ĉar ni ĉiuokaze reasertos niajn liberojn de informo, de esprimo, de manifestacio kaj de kunveno. Niaj organizaĵoj flegos, ĉie en Francio, tiajn lokojn kiuj ebligos debaton kaj ni atentos konstante ke niaj rajtoj kaj libero estu certigitaj kaj ke neniu estu viktimo de diskriminacio.

# Komuniko de Laika Agado-Centro en Belgio

**Solidaraj, kunaj kaj firmanimaj**

Nome de la humanismo kiun ĝi rigardas fundamenta valoro, nome de la solidareco kiu superu ajnokaze, nome de la frateco kiu unuigas la francan popolon, la Laika Agado-Centro volas esprimi sian koleron sekve de la fiaj atencoj kontraŭ Parizo lastan nokton.

Male al la atencoj kontraŭ *Charlie*, ne la esprim-libero estis ĉifoje celita. Temas pri vera militeca ago, zorge planita kaj celanta kiel eble plej da viktimoj. La religia fanatikismo invokita de la murdistoj sendube estas nur prezento por trompi la opinion.

Ne estas taŭga momento por profundaj strategiaj analizoj, nek pli por starigi la komunumojn unu kontraŭ la aliaj. Fronte al la krima barbareco, gravas nur la solidareco de ĉiuj demokrataj civitanoj, sendepende de ties opinioj kaj konvinkoj, por la neniigo de la terorismo kaj por la batalo kontraŭ ĝiaj generantoj.

La Laika Agado-Centro esprimas al la familioj kaj al la proksimuloj de la viktimoj, siajn kondolencojn konsternite de tiu nepravigebla violento.

La CAL alvokas la registaron, sed ankaŭ la entreprenojn kaj ĉiujn koncernatajn instancojn, ke ili atente kaj ekstreme prudente konsideru la diplomatajn kaj komercajn rilatojn kiujn ili flegas kun grupoj kaj Ŝtatoj suspektindaj je subteno al la terorismo. La eventuala ekonomia prezo ne estu konsiderata fronte al tiu de homaj vivoj. Ĝuste tie komenciĝu la « senkompata » lukto, laŭ la esprimo de la prezidento de la Respubliko, kontraŭ la malamikoj de la demokrateco.

Ni cedu nek antaŭ la timo, nek antaŭ la provoj de politika memprofito, nek antaŭ dubigaj analizoj, kaj ni invitas ĉiujn civitanojn je ĉiuj opinioj, kredoj, konvinkoj, pluresti unuigitaj kaj firmaj en la batalo. Pluige al nia ĉiesa libereco.

# Deklaro de Mondcivitana Asembleo

**Ni, mondcivitanoj, kunvenintaj en Asembleo la 22-an de novembro 2015** en *Ungersheim* (Francio), forte kortuŝitaj pro la atencoj plenumitaj en Parizo vendrede la 13-an de novembro, esprimas nian solidarecon kun la familioj, kiuj priploras forpason de unu el siaj anoj, kaj kun ĉiuj, kiuj estas vunditaj en sia korpo aŭ en siaj rilatuloj. Nia solidareco etendiĝas al ĉiuj viktimoj de similaj eventoj, kiuj okazis lastatempe en **Bruselo, Tunizo, Bejruto, Bamako** aŭ en la **sinaja** ĉielo kaj kiuj okazas ankoraŭ en multaj landoj kie la loĝantaroj estas submetitaj al teroro, eksproprietigo, malestimo.

**Ni denuncas** ĉiujn formojn de integrismo, kaj ĉiun perfortan agon kiu ajn ĝi estu, faritan kontraŭ personoj aŭ ties posedaĵoj.

**Ni surpriziĝis** pri iuj reagoj en kiuj temas nur pri milito, sekureco, urĝa stato, bombado, senrajtigo de ŝtataneco, "barbaroj", "sango malpura [kiu] verŝiĝas en niajn sulkojn".

**Ni bedaŭras** la mankon de paroloj pri la ekonomiaj interesoj kun iuj landoj pri nafto, armilvendoj, akvoregado, aŭ io alia.

**Ni denuncas** la ĝermojn de perforto, kiujn konsistigas la mizero de plej multaj apud la abundeco de malplimulto de la terloĝantoj, la atmosfera poluo, la akva poluo, la akaparo kaj la malŝparado de la fosiliaj energiaj rimedoj kaj de la raraj krudaj materialoj, la demografia eksplodo, la mona disordo.

**Ni rememorigas** la antaŭkonsiderojn de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, laŭ kiuj: "Pro tio, ke nepre necesas, por ke la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo".

**Ni deklaras** ke paco kaj libereco estas fundamentaj rajtoj.

**Ni admonas** la bonvolajn virinojn kaj virojn el ĉiuj devenoj ekstari kaj agadi por ke la fundamentaj homaj rajtoj estu obeataj ĉie en la mondo, kaj ne cedi al la manovroj kaj provokoj de la pov-aparatoj, kiuj agas direkte al celoj kontraŭaj al iliaj interesoj.

**Ni petas** la politikistojn, la ŝtatestrojn kaj la registarestrojn konduki la strukturajn reformojn necesajn sur la socia kaj internacia plano por ke la loĝantaroj estu protektataj kaj defendataj en siaj rajtoj kaj liberecoj.

**Pro manko de demokratiaj institucioj vere je la nivelo de la frontataj problemoj, ni invitas** la diversajn koncernatajn partiojn renkontiĝi kaj privilegii dialogon, konduki pripensadon kaj konkretajn agojn kontraŭ la milito kaj por la paco, por kune serĉi pacajn solvojn al la konfliktaj situacioj, kiuj sen tio, riskas finiĝi per sinsekvo de katastrofoj, pri kiuj neniu povas antaŭpensi la konsekvencojn.

*Ungersheim, la 22-an de novembro 2015*

# Komunikaĵo de la Internacia Federacio de la ligoj de Homaj Rajtoj

La Internacia Federacio de la ligoj de Homaj Rajtoj kaj ties franca aliĝinto *Ligue des droits de l'Homme* (Ligo de Homaj Rajtoj) kondamnas per la plej granda firmeco la terorismajn agojn okazintajn dum la nokto de la 13a ĝis la 14a de novembro 2015 en Parizo kaj *Saint-Denis*.

Ni esprimas niajn sincerajn kondolencojn al la familioj de la mortintaj viktimoj kaj nian solidarecon kaj dezirojn de resaniĝo al la multnombraj vunditoj. Ni atestas pri la solidareco esprimita tiujn pasintajn horojn fare de multaj organizaĵoj, membroj kaj defendantoj de Homaj Rajtoj en la tuta mondo.

Ja la tuta homaro estas celita de tiuj abomenindaj atakoj.

Ni substrekas, ke la alprenitaj eksterordinaraj aranĝoj, kvankam ili respondas al la nuntempa urĝeco, devas aplikiĝi por limigita periodo kaj sen ia ajn stigmatizado.

Ni aliĝas al alvokoj por civitana unuiĝo kontraŭ timo, por protekti la liberecojn, demokration kaj nian volon kune vivi.

# Mesaĝo de la agantoj de monda muziko kaj surscenaj spektakloj

Ni, profesiuloj, artistoj, aŭtoroj, sindikatoj, federacioj kaj retoj, help-organizoj, civilaj socioj de la muzika mondo kaj la surscenaj spektakloj, ankoraŭ vunditaj kaj konsternitaj pro hororo, plu staras kaj restas firmaj memore al ĉiuj viktimoj, kaj solidaraj kun ĉiuj homoj en iliaj kulturaj praktikoj.

Ĉi tiuj tragediaj okazaĵoj memorigas nin ke la libereco, la kreado kaj la esprimado estas fragilaj. Ĉar la spektakloj vivigas kaj vibrigas nin kune, ĉar ili enkarnigas la valorojn de malfermiteco kaj toleremo, ili estas celoj, sed povas esti ankaŭ la remparoj kontraŭ obskurantismo kaj fanatikeco.

Ni daŭre kondukas niajn aferojn en kiel eble plej bonaj sekurec-kondiĉoj. Ni bezonas unu la aliajn por dividi momentojn, ideojn, kaj emociojn, en spektaklejoj kaj en festivaloj same kiel en kafej-terasoj kaj en stadionoj.

Krei, teatri, produkti, disvastigi muzikon kaj spektaklojn, kuraĝigi renkontiĝojn; estas tio kion ni defendos, sen malamo kaj sen timo.

**La SPEKTAKLOJ estas VIVANTAJ!**

# Deklaro de Internacia Ligo de Senkonfesiuloj kaj Ateistoj

Ni, anoj de la estraro de la Internacia Ligo de Senkonfesiuloj kaj Ateistoj (germana mallongigo IBKA), estas ŝokitaj pro la atencoj de la hieraŭa vespero en Parizo. Ni estas teruritgitaj pro tiu masakro farita de supozeble religie motivitaj atencintoj. Niaj pensoj estas ĉe la parencoj kaj viktimoj de tiuj abomenaj agoj.

Religia fanatikeco montris sian plej malbelan vizaĝaĉon en la koro de Eŭropo.

Vide al tio multaj sentas sin senhelpaj kaj senpovaj.

Tio estas atako kontraŭ nia konsiderinde ampleksa laika vivmaniero, denove en la laika Francio. Tiuj atencoj ankaŭ sin direktas kontraŭ niaj konvinkoj pri liberema kaj individua memdetermino.

Eĉ se dum la venontaj tagoj denove okazos funebraj diservoj, tiuj atakoj denove igis klara: la mondo ne bezonas rifuĝon ĉe antikvaj religioj, sed la idealojn de la epoko de racionalismo kaj de la laikeco. Ni esperas ke la nun sekvantaj politikaj reagoj de niaj francaj geamikoj honorigos tiujn idealojn kaj ke ni ne lasos nin puŝi de tiuj dibatalantoj al ajna rezigno de tiuj idealoj.

# Komuniko de la sindikata unuiĝo Solidaires (Solidaraj)

**Solidareco kaj rezistado**

La sindikata unuiĝo Solidaraj esprimas sian profundan tristecon kaj solidarecon kun la viktimoj de la atencoj, kiuj skuis Parizon hieraŭ vespere, kun ties familianoj, gekolegoj kaj geamikoj.

Ĝi salutas la kuraĝon de la personoj, funkciuloj, agentoj de la publikaj servoj, membroj de la civila sekureco, kiuj intervenis kaj sukuris ilin.

La sindikata movado estas elemento de demokratio kaj kolektiva lukto por socio egaleca, sociale justa kaj paca. Nia batalo kontraŭ ĉiuj faŝismoj kaj por socia transformo plene legitimiĝas post tia hororo.

La sindikata unuiĝo Solidaraj partoprenos en la solidara agado helpe al la viktimoj. Ĝi zorge sekvos la evoluon de la situacio kaj fronte kontraŭstaros kun ceteraj sociaj movadoj por rifuzi cedi al la insidema teroro. Sed ĝi ankaŭ restas atentema al ĉiu malpliigo de la publikaj liberecoj en nacia kaj internacia kunteksto, kiu daŭre pligraviĝis depost la januaraj atencoj.

Ni forĵetas ĉiun stigmatizadon de parto de la popolo pro ĝia origino aŭ religio, ĉiun proreligian maltoleremon kaj daŭre batalados kontraŭ tiaj sintenoj aŭ politikoj en la entreprenoj, servoj kaj ĝenerale en la socio.

Veraj solvoj por paco kaj socia justeco nepras.

*Parizo, la 14an de novembro 2015*

# Palestino: okupado kaj lingvaj konfliktoj

Tiuj, kiuj jam vojaĝis al Palestino verŝajne vizitis Hebronon. Kaj tiuj, kiuj iris al Hebrono verŝajne trairis la straton *Ŝuhada*. Tiu strato koncentras multe de la (materiaj kaj simbolaj) kontraŭdiroj de la konflikto. Estas ĉi tie, kie plej perforteme sentiĝas la milita okupado kaj kie agas la plej ekstremismaj koloniistoj. Estas ankaŭ ĉi tie, kie religiaj historioj kolizias sen spacoj por komunikado inter la komunumoj. Tio faciligas tag-post-tagan humiligon, kiun ĉi tie oni vivas plej intense.

Kiel por la cetero de Cisjordanio, Israelo okupis Hebronon en 1967, ekkomencante tuj la koloniigon. Male al aliaj areoj, en Hebrono koloniistoj ne loĝas en la montoj ĉirkaŭantaj la urbon, sed en la centro de la urbo mem. En 1994 unu el ili mortigis 29 homojn kiuj preĝis en la moskeo. La israela registaro reagis fermante la straton *Ŝuhada* al palestinanoj. Ĝis tiam, ĝi estis la kerno de la urbo, transiranta la ĉefan merkaton kaj alvenanta ĝis la Tombo de la Patriarkoj (konata ankaŭ kiel la Moskeo de *Ibrahim*), sankta loko kaj por judismo kaj por islamo). Post la atako, la aliro estis dividita inter la moskeo kaj la sinagogo "pro sekurecaj kialoj".

Nuntempe estas kontrolo-punkto ĉe la enirejo, kiu malebligas la paŝadon de la palestinanoj, kun kelkaj esceptoj, t.e. tiuj malmultaj familioj kiuj ankoraŭ vivas en la areo kaj nur povas atingi sian hejmon kelkajn metrojn trans la strato kaj tiuj infanoj kies lernejo situas en tiu parto de la urbo. Sed ne forgesu, ke ĉio ĉiam dependas de la tiutempa decido de la soldatoj gardantaj la koridoron. La palestinanoj kiuj volas iri al la moskeo devas fari longan rondiron, ĉirkaŭante areon, kiu ĝis ne tro longe rolis kiel la ĉefa merkato de la itinero inter Kairo kaj Mekko, nun fermita.

Ni, la turismemaj eŭropanoj, rajtas trapasi ĝin senprobleme. Kaj se ni venas el Barcelono, ni verŝajne konversacios pri *Messi* kun la soldatoj, amikeme. Pasinte la kontrol-punkton, jen perturba sento: ni ĉeestas militzonon. Ĉiuj butikoj estas fermitaj. Jen fantoma strato kie promeni sentiĝas kiel trairi longan vojon. Nur militaj veturiloj kaj kelkaj koloniistoj transiras ĝin. Havante nur dek ok jarojn de matureco, *Ali* kaj *Eias* ripetis al ni: "Se ni trapasus tiun ĉi punkton, post du sekundoj oni pafus nin." Tiumomente, ni pensis ke ili troigas.

Ni primemoris tiun rakonton kiam ni legis pri lastatempa okazaĵo precize ĉe la strato *Ŝuhada*. La 22an de septembro 2015, frumatene, palestina knabino kovrita per nikabo alproksimiĝis la kontrol-punkton. Ŝi nomiĝis *Hadil Salah Haŝlamun* kaj havis dek ok jarojn. Ŝajnas ke la junaj soldatoj timiĝis kaj pafis ŝin. Sep pafoj. La knabino estis sanganta 40 minutojn ĝis la alveno de israela ambulanco. Ĉe la hospitalo en Jerusalemo, oni ne povis savi ŝian vivon.

Hodiaŭ ni scias pli da detaloj danke al *Faŭad Abu Aiŝeh*, kiu travivis la tutan okazaĵon. Kiam li vidis, ke la soldatoj kriis al la knabino, li foririgis la infanojn kaj alproksimiĝis. Li klarigas ke la soldatoj volis ke la knabino iru reen, sed ŝi restis senmove. Li tradukis tuj la ordonon en la araban, sed la knabino estis tute blokita. *Faŭad* petis al la soldatoj lasi lin preni ŝin preter kelkajn metrojn por klarigi kio okazas. Tiam, tamen, venis pliaj soldatoj kiuj forkurigis lin. Ili sekvis kriante al la knabino hebree, t.e. en lingvo kiun *Hadil* ne povis kompreni.



**Hadil**

Kvin minutojn post la pafado, palestina ambulanco venis sed ĝi ne rajtis atingi *Hadil*. Dume, koloniistoj fotis, soldatoj ŝercis kaj palestinaj infanoj rigardis la scenejon. Uzante internacian juron, se ni intencas kompreni la faktojn, ni devas priparoli la sekvojn de la okupado. Tiucele la palestinanoj montros al ni dekojn da rezolucioj de UNo kaj aldonos nuance ke la tuta Palestino estas okupita: parto ekde 1967 kaj parto ekde 1948. Kaj ili memorigos al ni, ke najbaraj landoj kiel Jordanio kaj Libano restas, eĉ hodiaŭ, la du ŝtatoj en la mondo kun la plej alta procento de rifuĝintoj kun respekto al sia loĝantaro.

Revenante al *Hadil*, denove la murdinto estas soldato kaj denove la



viktimo estas knabino, aldonante al la humiligo la tutan pezon de la genra dimensio. Struktura perforto. Tamen, ekde kiam ni legis la novaĵon, ni opinias ke mankas fundamenta elemento en la analizo. Eble se ŝi parolintus la hebrean aŭ se oni estus alparolinta ŝin en la araba, la situacio povintus ŝanĝiĝi. Eble se iel ili interkompreniĝus... Estas evidente, ke sen la lingva konflikto, la okupado kaj perforto ankoraŭ daŭrus, sed eble tamen *Hadil* estus vivanta.

En Israelo ekzistas du oficialaj lingvoj: la hebrea kaj la araba, kun la angla kiel tria lingvo *de facto*. La lingva pejzaĝo montras malsamajn situaciojn kun oftaj konfliktoj inter la komunumoj. En la judaj, la plejparto de la signoj estas hebree kaj angle; en la palestinaj, hebree kaj arabe; kaj en Orienta Jerusalemo (kie loĝas precipe palestinanoj sen israela civitaneco) kutime ili estas arabe kaj angle. Plie, en Palestino la sola oficiala lingvo estas la araba, sed ĉe aŭtovojoj pleniĝas afiŝoj nur en la hebrea rilatante al kolonioj kaj al areoj kun milita kontrolo.

Por enprofundiĝi en nuancoj kaj kompleksaĵoj, menciindas lingvoj de la enmigrado, kiel la rusa, kiu en la lastaj jardekoj atingis signifan publikan spacon kaj sur la stratoj kaj en amaskomunikiloj. Aliflanke, la judoj veninte el arabaj landoj ne nepre reflektas tion en siaj lingvouzoj. Kelkaj aŭtoroj rilatigas tion al la konstruo de la israela identeco. Ekde kiam la aŝkenazoj cedis la jidan, t.e. sian lingvon, al la hebrea, tiu ĉi ludis (kaj ludas) gravan rolon koherigante ekstreme fragmentan socion. Dume, sur la papero, la araba restas ankoraŭ la dua oficiala lingvo, kune kun la hebrea.

Tiu teoria dulingveco ofte fariĝas klara situacio de diglosio, kie unu lingvo havas pli gravajn funkciojn ol la aliaj. Hebrea estas lingvo de administrado, armeo, tribunaloj, universitato... En judaj lernejoj, oni studas la araban kiel fremdlingvon kaj ofte la lernantoj ne atingas nivelon, kiu ebligos fluan komunikadon. Ne forgesu ke en ambaŭ kazoj temas pri lingvo de la malamiko. En la okupitaj teritorioj, la hebrea estas la ĉefa lingvo por interparoli kun koloniistoj kaj soldatoj.

Evidente tiuj streĉiĝoj rilatas al aliaj pli ampleksaj sociaj kaj politikaj, al struktura perforto – sufoka kaj ĉiea – kaj eĉ al ĉiamaj luktoj inter tradicio kaj moderneco. El nia vidpunkto, eble la lingva dimensio ne estas tiel grava kiel la aliaj. Eble en kunteksto de armita konflikto ĝi estas malĉefa dimensio. Eble povas okazi, ke ĝi memsolviĝos nature kiam paco atingiĝos. Eble. Sed ni ne ĉesas pensi pri *Hadil*.

Xavi Alcalde

Katalunlingva versio: https://directa.cat/actualitat/palestina-ocupacio-conflicte-linguistic

# Antisemitismo

Mi opinias ke en la nuna mondo apenaŭ estas pura antisemitismo kiel estis ja antaŭ la Dua Mondmilito. Mi legis multajn antisemitajn aludojn en literaturo tiama kaj ne nepre devena el ekstremdekstraj medioj. Kompreneble la ekkono pri la teruraĵoj de la koncentrejoj helpis al tio. Sed tio helpis ankaŭ al la konstruo de nova ŝtato Israelo kaj al la agnosko de granda parto de la internacia komunumo, sed ne de la tiamaj arabaj landoj. Poste la historio multe evoluis, sed la fakto estas ke Israelo ne restis ene de siaj limoj, sed por defendi sin kontraŭ malamikoj, povis nur invadi apudajn teritoriojn kaj ne nur tiujn kiuj estis okupitaj post la grandaj militoj sed ankaŭ aliajn, kiel Golano ekzemple. Ĉiuj venkintaj landoj ja invadas teritoriojn, sed post kelkaj jaroj oni redonas ilin. Israelo tute male, malobeante decidojn de UN. Tio estas la tialo de nova sento kiu ja estas ofta en la maldekstro nome kontraŭstaro de tiu invadanta ĉikananta ŝtato, kiu krome konsistas el juda ŝtato, pro kio la nova sento povas esti konfuzata kun kontraŭsemitismo.

Mi ekzemple agnoskas la valoron de multaj judaj gravuloj. En mia lando Hispanio la juda heredo gravas ĉefe kulture. Kolego mia konvertiĝis al judismo, kaj krome li lernis Esperanton, kvankam li ne esperantistiĝis. Dum kongresoj mi ofte amikiĝis kun israelaj esperantistoj, bedaŭrinde ĉiuj judoj (mi diras bedaŭrinde, ĉar apenaŭ venis al Esperanto arabaj israelanoj, kaj araboj ĝenerale, sed tio estas alia historio). Mi agnoskas la modernecon de la nova socio israela, kiu ricevis homajn kontribuojn de multaj mondoregionoj, inter aliaj hispanlingvajn. Ja kvazaŭ Esperanto. Mi agnoskas la valoron de socio kiu sukcesis defendi la landon kontraŭ la ĉirkaŭaj malamikoj kaj sukcesis konstrui novan ekonomion tie, same kiel faris ties prapatroj en multaj mondoregionoj iam.

Tamen mi ne povas forgesi la jam menciitan aferon pri invado. Mi komprenas, ke estas ege malfacile serĉi pacajn negocadojn, sed ĉiam eblas iel. Ju pli daŭros la stato de okupo de fremda lando nome Palestino, krom Golano ktp., des pli malfacile estos trovi pacon en tiu mondoregiono. Kaj tiu situacio havas kulpulojn, ĉefe defendite de usonaj instancoj, sed ankaŭ tio estas alia historio. En tiu situacio mi komprenas ke en maldekstro de multaj landoj oni konsideras tiun fakton malaprobinda kaj eĉ ke oni bojkotas israelanojn foje. Tio okazis en Hispanio en pasinta septembro. Fama kantisto ricevis premojn por ne kanti en konata festivalo; finfine li kantis sed okazis protestoj. Tamen ankaŭ en mia regiono kaj samepoke ankaŭ kantis israela kantistino Noa en iom maldekstra etoso kaj okazis nenio. Do, tio dependas. Pri bojkotoj ni ne parolu, ĉar ja estas diskutebla ĉu bojkoto al israelano malhelpas la ŝtaton Israelo. Sed la ekzisto de etenda sento kontraŭ Israelo estas logika. Kaj tio povas esti konsiderata nek kontraŭsemitismo nek kontraŭjudismo, sed nur kontraŭisraelismo, kion la lingvoj ankoraŭ apenaŭ diras. Porisraeluloj (ne nepre israelanoj) diras ke tio estas antisemitismo por rilati tion al la fiagoj de nazioj. Sed tio konfuzigas nur naivulojn.

Estas ankaŭ la alia flanko de la temo, nome rilato de judoj al internaciaj financoj. Estus naiva nuntempe pensi ke judoj kontrolas tion, aŭ ĉinoj aŭ rusoj. Tion kontrolas riĉaj posedantoj ĝenerale kaj ties perantaj teknikistoj, kiuj kompreneble ricevas grandan parton de la torto. Iam la kontraŭkapitalisma sinteno estis parto de kontraŭjudismo, hodiaŭ tio ne havas sencon. Mi, kiu aparte admiras la araban kulturon, kvankam ne

Islamon ĉefe pro facileco de tiu al ekstremismo, vidas ke granda parto de tiuj fifinancistoj estas arabaj gravuloj de la naftolandoj. Ĉu eblas ne ataki ilin? Krome mi vidas ke simplaj laboristoj israelaj, foje arabaj mem, suferas pro la malstabileco en la regiono. Ĉu eblas ne kompati ilin?

Multaj nunaj ŝtatoj defendas la ŝtaton Israelo, multaj eĉ pro propraj interesoj. Dum tio pluos, la situacio pluos. Sed mia sinteno kontraŭ la ĝenerala politiko de la ŝtato Israelo ne devas esti konsiderata kontraŭ-semitismo.

Kani



# Antisemitismo (2)

La antisemitismo, rasismo ktp certe ankoraŭ havas sencon, almenaŭ historian. La franca antisemitismo, naskita en la 19-a jarcento (*Edouard Drumont*) kaj malkaŝe disvolvita ĝis 1944 (*Pétain* ktp), estas same kontraŭaraba kiel kontraŭjuda. Ĝi eĉ nomis la judojn "araboj" kaj esprimis, ke la araboj "estas tolereblaj (ba, eĉ eventuale admirindaj) en siaj dezertoj" sed estas nepre nedezirindaj en Eŭropo. *Hitler*, kiu ŝajnige subtenis la Muftion el Jerusalemo kontraŭ la judoj, certe multe amuzis sin per la ideo de batalo inter semidoj.

Semitaj (semidaj laŭ PIV) estas multaj gentoj, kiuj jam de la plej malnova antikvo gravege kontribuis al tio, kion oni nomas "moderna okcidenta civilizo" en ĉi ties plej bona senco.

Mi konsentas, ke tiuj ideologioj de malamo estas resumeblaj per la vorto "ksenofobio". Ilia naŭza influo ekspluatas, sistemigante ĝin, naturan ksenofobion, kiu estas natura laŭmezure kiel estas nature malfidi tion, kion oni ne konas kaj ne komprenas. Historie, ekzistis ja ksenofobaj tendencoj en laboristaj movadoj, kiujn ili koruptis per sia ideologia veneno. Ekzistas certaj intencaj streboj pluvivigi tiujn tendencojn. Konforme al la statuto de SAT estas kontraŭbatali ilin. Estus naive kredi, ke ne plu bezone estas kontraŭbatali ilin aŭ iliajn insidajn formojn eĉ en SAT mem.

Petro Levi



**Edouard Drumont**

# Ĉu antisemitismo aŭ judofobio?

"Antisemitismo" ankoraŭ havas sencon, por kiuj interesiĝas pri historio.

Ĝis la 19a jarcento ekzistis judaj komunumoj, kiuj vivis pli-malpli pace, ni preferu "kamaradece" kun la aliaj enloĝantoj en Alĝerio. Ili tute ne distingiĝis de la aliaj araboj, ĉu lingve, ĉu veste, eĉ per siaj nomoj. Ne estis eble scii, ekzemple, ĉu S-ro "*Moussa Stambouli*" estas islamano aŭ judo.

En tiu lasta kazo, *Moussa* poste fariĝis "*Moïse*", aŭ pli freŝe "*Mojŝe*" en la kazo, kiam li elmigris Israelon ("*Musa*" estas la araba nomo de la juda profeto "*Mojŝe*"; tiun antaŭnomon oni ne trovas en la kristanaj kulturoj, kiuj havas malnovegajn judofobiajn tradiciojn).

Laŭtempe, la alĝeriaj judoj pli kaj pli proksimiĝis al Francio kun la sinsekva intervenado de la franca koloniado, de la dekreto *Crémieux*, kaj de la cionismo.

En 1870 en Alĝerio ekzistis indiĝenoj judaj aŭ islamanaj tute ne distingeblaj, ĉiuj viktimoj de tiu antisemitismo. Tiam intervenis la dekreto *Crémieux*, kiu donis la francan ŝtatanecon (en Francio oni diras *citoyenneté*, alivorte "civitanecon") al judoj kaj kompreneble ne al araboj (malnova principo "dividi por regi").

Do la judoj fariĝis plenrajtaj francaj civitanoj. Tiam la antisemitistoj laŭte grumblis, ĉefe la koloniantoj en Alĝerio. Ili tute ne volis la liberiĝon de la indiĝenoj, tiel judaj kiel islamanaj. Ili eĉ sukcesis en 1940, kiam la generalo *Petain* en Francio fariĝis ŝtatestro. Tiam la dekreto *Crémieux* estis nuligita kaj la judoj de Alĝerio refariĝis indiĝenoj ĝis 1943.

La antisemitismo ne estas sen-sencaĵo. Cetere, hodiaŭ la termino

estas konfuza, kaj konfuzige uzata. Estas oportune starigi konfuzojn inter anti-cionismo kaj anti-semitismo, anti-imperiismo kaj anti-amerikanismo, samkiel hieraŭ inter anti-stalinismo kaj anti-komunismo. Mi preferas do, kiel dirite, deklinacii la fobiojn laŭkaze, judo-, islamo-, arabo-, kristano-, germano-, eĉ usono-, ĉiam *kseno*-fobio.

Mi cetere tute ne kredas je la danĝero de nova judofobio en Eŭropo. “Se tiel dirite la grandaj eventoj ripetiĝas du fojojn, [...] la unuan kiel tragedio, la duan kiel farso” (*Marx*).

Hodiaŭ oni ne plu prezentas la judon *Ŝilok* kun kurba nazo kaj kroĉaj fingroj, sed la islamanon Mohamedo kun bombo en la turbano. Kaj kompreneble nur islamanoj estigis la atencojn de la 11a de septembro. Serĉu la eraron...

Kaj la okcidentaj imperiistoj de Vaŝingtono ĝis Tel-Avivo (la akso de la bono) revas detrui Iranon, kie ĝisnune pace vivas juda komunumo, por tie senkatenigi novan judofobion, kiel ili jam tion faris en Irako kaj Sirio... Ĝis kien iras tiu freneza antaŭenfuĝo de la sistemo, kiun multaj, eĉ en la laborista movado, ne volas vidi?

Ĝemil



**Crémieux**

# Akaparado de la terenoj – ankoraŭ kaj ankoraŭ aktuala

Gravaj plurlandaj firmaoj, ŝtatoj, riĉeguloj plu akaparas la fekundajn terenojn, kiuj vivtenigis loĝantarojn, kaj tio en diversaj kontinentoj. Tiuj spekulaciaj operacioj ofte estas subtenataj de la oficantaj registaroj, kiuj vendas aŭ ludonas terenojn de siaj landoj. Faraoneskaj konstruaĵoj, intensaj kultivadoj de GMO (genetike modifita organismo) kun larĝskala uzado de pesticidoj, grandaj projektoj kun publika neutileco... estigas labormankon, malsategon, migradon de la loĝantaro al la ladkvartaloj de la grandaj urboj, kaj favoras nesekurecon, malsanojn, epidemiojn.

## En Argentino

Por elturniĝi el la financa krizo, kiu trafis ĝin, la landestroj kuraĝigis intensan kultivadon de transgenaj maizo kaj sojfaboj sur milionoj da hektaroj. La respublikestrino estas la plej bona subtenantino de tiu GMO-kultivado. Konsekvence: familioj senhavigitaj je siaj terenoj kaj je siaj loĝejoj estas malsataj, ĉar sen laboro – la intensa kultivado necesigas neniun aŭ malmultan manlaboron. Ili iras plidensigi la loĝantarojn de la ĉirkaŭurbaj ladkvartaloj. La pesticidoj kaj herbicidoj (*Monsanto* per multaj afiŝtabuloj en la kampoj certigas sian reklamadon) elverŝitaj per aviadiloj en la kampojn infektas la akvojn, kiujn trinkas la vilaĝanoj, kaj estigas malsanojn. La loĝantaroj manifestacias kaj kelkaj vilaĝanoj instalis sin sub tendoj antaŭ la parlamento por protesti pro sia nefirmeco, sed tio estigas neniun reagon de la politikuloj.

## Nikaragva lago

La fosado de la kanalego trairanta Nikaragvon por suplementi tiun de Panamo, estigas gigantan laborejon, kiu pretiĝas ruinigi tiun malgrandan mezamerikan landon. Kun du oceanoj, grandega lago, vulkanoj, vera tropika arbarego, Nikaragvo estas unu el la plej fabelaj teritorioj de la planedo loĝata de indianoj, nigruloj, mestizoj. La eksa gerilano *Daniel Ortega*, diktatoro estranta ekde 2007, sola ĵus decidis vendi sian landon al ĉinaj investantoj, kiuj devas konstrui kanalegon por ebligi la pason de kontener-ŝipoj de pli ol 250 000 tunoj. Ĉinio trovus tie historian ŝancon ekpaŝi sur la amerika kontinento. La alproprigo de vastaj teritoriaj partoj fare de la *Ortega*-klano havas kiel celon: povon kaj monon. La kanaltrako tra la lago laŭ 105 km de longeco estigas gigantajn problemojn, ĉar la akva profundeco estas ofte malpli ol 10 metroj, dum necesas 27 ĝis 30 metroj. Necesus dragi milionojn da tunoj da sedimentoj, kio ruinigus la lagan ekosistemon, la plej granda rezervo de sensala akvo en la lando kaj en la tuta regiono inter Meksikia sudo kaj Panamo. Dekoj da protest-manifestacioj okazis de unu jaro kaj la plej freŝdata, en lasta junio, arigis milojn da homoj. Ĝis kiam necesos atendi subtenon de la tuta mondo por preventi tiun katastrofon?

## En Tanzanio

Masajoj rezistas de jardekoj kontraŭ la alproprigo de siaj tradiciaj terenoj far profitemaj investantoj, kiuj deziregas la regionan faŭnon por turismo kaj ĉasado. La Tanzania prezidento, konfrontita al popola premo, rezignis la konfiskon de la masajaj terenoj, sed la promesoj ne estas respektitaj kaj la masajaj loĝantaroj ricevis la informon, ke ili devas forlasi sian teritorion.

## En Brazilo

Por kontentigi siajn energiajn bezonojn Brazilo konstruas multajn baraĵojn en la riveregoj. Vidante siajn terenojn minacataj, la indiĝenaj popoloj plene mobiliziĝas kontraŭ la laborejoj. Manifestacioj arigas la ĉeriverajn komunumojn, la religiajn ĉefojn, kaj ili marŝadas laŭ la ritmo de la tradiciaj kantoj kaj paroladoj, asertante, ke la diverseco de la energiaj fontoj estas ebla, kaj denuncante la intereskonfliktojn ekzistantajn por elekti baraĵojn. La polica armeo ĉirkaŭfermas la vilaĝojn. La konstruado de la baraĵoj estas ne nur punkto de malakordo, sed ankaŭ parto de la vera konflikto: tiu de la

limoj de la indiĝenaj teritorioj. Tamen, laŭ la brazila konstitucio, la prapatraj teritorioj estas nefordoneblaj, sen iu ajn ebleco de intertraktado.

**En Francio**


La fenomeno de la malpliigo de la agrikulturaj terenoj estas maltrankviliga realeco. De la 60aj jaroj, la minaco pendas super la plugeblaj terenoj (kultureblaj, inkluzive de la novaloj), la paŝtejoj kaj furaĝaj herbejoj, la vitkampoj, la legomĝardenoj; averaĝe 110 000 hektaroj estas jare perditaj. Ĉefe pro betonado malaperas la agrikulturaj terenoj. Tio havas diversajn formojn – ĉirkaŭ 70 000 hektaroj jare: industriaj kaj komercaj areoj, substrukturoj por la transporto, minejoj kaj ŝtonminejoj, rubejoj kaj konstruado de loĝejoj, ktp. La pli ofta modelo de la individua domo, la malforto de la politikoj de protektado de la agraj areoj aŭ la kvazaŭ ekskluziva kredo je la ekonomia potencialo de la grandaj projektoj (ofte neutilaj) de substrukturoj estas tiom da demandoj por fari kaj debati. Artefariteco estigas ankaŭ maltrankviligajn ekologiajn konsekvencojn: disfluado de pluvakvoj, erozio, kiu estigas terŝoviĝojn, inundoj. Ĝi partoprenas en la klimata ŝanĝiĝo, fragmentigas la naturajn habitatojn, la pejzaĝojn, kaj afliktas la biodiversecon. Ĉie tra la mondo homoj indignas, provas defendi la terenon por plu vivi harmonie kun sia medio, protektante ĝin.

MSM (Monda Solidareco kontraŭ la Malsato) kredas je interpopola solidareco, ĉar:

**La tero nutrus ĉiujn homojn, se ĉiu solidare agadus.**

Claudine Tournier

*Publikigita en la revuo Monda Solidareco, n-ro 114.*







# Klimat-inteligenta agrikulturo: la ĉefa motoro de la Verda Ekonomio

Iniciato [1] de Tutmonda Agrikultura kaj Nutraĵa Organizaĵo (TANO), subtenata de la Tutmonda Banko, la Klimat-Inteligenta Agrikulturo (KIA – *Climate-Smart Agriculture* en la angla) asertas ke "atingi nutraĵan sekurecon kaj respondi al la defioj de la klimatŝanĝiĝo estas du celoj kune atingotaj" kaj "pro tio ĉi la agrikulturo, fiŝkaptado kaj forstado en la disvolviĝantaj landoj devas submeti sin al konsiderinda transformo" [2].

Supraĵe, la KIA povas aspekti pozitiva iniciato. Sed se ni observas la detalojn de tio, kion oni konsideras KIA, ni ekkonscias, ke ĝi laŭesence estas projekto por ŝanĝi la nomon de la industria agrikulturo, ĝin nomante "klimat-inteligenta". La KIA provas intence forviŝi la limojn inter nutraĵa suvereneco agroekologia mastrumata de la kamparanoj, kaj la agrikulturo regata de la grandfirmaoj. Ĝi agnoskas nek ke estas la industria agrikultura sistemo, kiu ellasas karbondioksidon, nek la urĝan neceson disiĝi de tiu ĉi sistemo por direktiĝi al agroekologio baziĝanta sur la kamparanaro por solvi la klimatan krizon.

La KIA metas la agrikulturon en la manojn de la industri-agrikultura sistemo kaj eĉ premias ĉi lastan pro tio ĉi. Pluraj el la ĉefaj industri-agrikulturaj firmaoj kiel *Monsanto* (GMO-oj), *Yara* (kemi-sterkaĵoj) kaj *Walmart* (giganta podetalisto) estas ĉiuj apogantaj la KIA-n. *Monsanto* asertas ke la agrikulturo genetike modifita estas klimat-inteligenta ĉar ĝi helpas la senplugan agrokulturon kaj la toleron al sekego. Tamen, kiel ni jam scias, la GMO-oj plimultigas uzon de agrikulturaj toksaĵoj, favoras industri-firmaan agrikulturon kaj plie produktis eĉ ne unu utilan econ favore al adaptiĝo al la klimat-ŝanĝiĝoj.

Aldone al ĉio ĉi, la KIA subtenas, ke agrikulturo partoprenu en la karbon-kompensaj programoj, kio estos plia faktoro por elproprietigo de la gekamparanoj, ĉefe en la suda hemisfero. Ĝi plie surŝultrigas la ŝarĝon de la klimat-ŝanĝa mildigo al tiuj, kiuj estas plej senŝirmaj antaŭ la klimata krizo [3], sed kiuj malplej kontribuis al ĝi, ampleksigante la karbon-merkaton kaj ĝian financan spekuladon [4].

La KIA "provas kovri siajn spurojn kaj kaŝi la neceson de vera agrikultura reformo. Ĝi kaŝas kaj primensogas ankaŭ la problemon de la mankoj je tero kaj naturaj resursoj. La tero kaj la naturaj resursoj estas tre malmultaj nur al la gekamparanoj pro la akaparado, kiun plenumas la grandfirmaoj" [5].

Multaj registaroj konsideras, ke la KIA estas interesa, kaj estas partoprenantaj en ĝi.

Ni mobiliziĝu por haltigi ilin.

*Fonto: Bulteno Nieleni n-ro 20*
*http://www.nyeleni.org/*
*Trad. de Robin' BETO*

Notoj:

[1] Bulteno *Nieleni* n-ro 10, pri la Verda Ekonomio.

[2] http://www.fao.org/climate-smart-agriculture/72610/en

[3] *Carta abierta de la sociedad civil sobre la alianza global por la agricultura climáticamente inteligente*, septembro 2014, www.climatesmartagconcerns.info/espagnol.html

[4] k [5] Via Campesina (septembro 2014) *Desenmascarando la Agricultura Climáticamente Inteligente*.



# La grandaj urboj



**Juna Engels**

Tia urbo, kia Londono, kie oni povas migri dum horoj sen eĉ atingi la komencon de la fino, sen renkonti la plej etan signon, kiu konkludigas la proksimon de plata kamparo, estas afero por si mem. Tiu kolosa centriĝo, tiu amasigo de tri milionoj kaj duono da homoj en unu punkto centobligis la forton de tiu tri milionoj kaj duono da homoj; ĝi levis Londonon en la rangon de la komerca ĉefurbo de l' mondo, ĝi kreis la gigantajn dokojn kaj la milojn da ŝipoj, kiuj ĉiam kovras la riveron Tamizo. Mi ne konas ion pli imponan ol la vidaĵon, kiun ofertas Tamizo, se oni veturas de la maro al *London Bridge* (Ponto Londono). La domaj amasoj, la ŝipkonstruejoj sur ambaŭ flankoj, precipe ekde Woolrich, la sennombreble multaj ŝipoj laŭ ambaŭ bordoj, kiuj pli kaj pli kuniĝas kaj fine lasas nur malvastan liberan vojon en la mezo de la rivero, vojon sur kiu centoj da ŝipoj preterpafiĝas unu la alian – ĉio ĉi estas tiel grandioza, tiel amaseca, ke oni tute ne povas trankviliĝi, ke oni miras pri la grandeco de Britlando antaŭ ol oni paŝas sur anglan teron.

Sed la viktimojn, kiujn ĉio ĉi kostis, oni malkovras nur pli poste. Se oni vagadis kelkajn tagojn sur la pavimoj de la ĉefstratoj, se oni trabatis sin streĉe pene tra la homa pelmelo, la senfinajn vicojn de veturiloj kaj ĉaroj, se oni vizitis la "aĉajn kvartalojn" de la mondurbo, nur tiukaze oni rimarkas, ke tiuj londonanoj devis oferi la plej bonan parton de sia loĝantaro por plenumi ĉiujn ĉi miraklojn, kiuj kvazaŭ svarmas en ilia urbo, ke cent fortoj, kiuj dormetis en ili, devis resti senagaj kaj subigitaj, por ke kelkaj malmultaj povu evolui sin pli tutece kaj per unuigo kun la fortoj de aliaj povu multipliKiĝi. Jam la stratopelmelo havas ion naŭzigan, ion, kontraŭ kiu la homa naturo ribelas. Tiuj centmiloj da homoj el ĉiuj klasoj kaj tavoloj, kiuj preterpremiĝas unu la alian, ĉu ili ne estas ĉiuj homoj kun la samaj ecoj kaj kapabloj kaj kun la sama intereso fariĝi feliĉaj? Kaj ĉu ili ne ĉiuj devus alstrebi sian feliĉon post pripenso per la samaj rimedoj kaj vojoj? Kaj tamen ili preterkuras unu la alian kvazaŭ ili havus tute neniun rilaton, kaj tamen la ununura interkonsentiĝo de ili estas la silenta, ke ĉiu el ili moviĝu sur sia flanko de la trotuaro, kiu troviĝas dekstre de li, por ke ambaŭ preterhastantaj torentoj sin ne haltigu reciproke; kaj tamen neniu havas la ideon honorigi la alian almenaŭ per rigardo. La brutala indiferenteco, la sen-senta izoligo de ĉiu unuopulo al sia privata intereso montriĝas ju pli naŭza kaj ofendiga des pli tiuj unuopuloj estas kunpremitaj sur malgranda loko; kaj kvankam ni scias, ke tiu izoligo de la unuopulo, tiu etspirita egoismo ĉie estas la principo de nia nuna socio, ĝi tamen prezentiĝas nenie tiom senhonte malkaŝite, tiom memkonscie ol ĝuste tie en la pelmelo de la granda urbo. La solviĝo de la homaro en monadojn, el kiuj ĉiu havas sian apartan vivoprincipon, la mondo de la atomoj tie estas pelita ĝis la ekstremo.

Tial okazis ankaŭ, ke la socia milito, la milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj malkaŝe estas deklarita tie. Kiel amiko *Stirner*, tiel ankaŭ la homoj rigardas sin reciproke nur kiel utilajn subjektojn; ĉiu ekspluatas la alian, kaj el tio sekvas, ke la plifortulo tretas la malplifortulon sub siajn piedojn kaj, ke la malmultaj fortuloj, do la kapitalistoj, ĉion enungigas, dume al la malfortuloj, al la povruloj apenaŭ restas la nuda vivo.

Kaj kio validas por Manĉestro, tio validas ankaŭ por Birmingamo, por *Leeds*, tio validas por ĉiuj grandaj urboj. Ĉie ekzistas barbara indiferenteco, egoista krudeco sur unu flanko kaj sennoma mizerego sur la alia flanko, ĉie estas socia milito, la domo de ĉiu estas sieĝata, ĉie ekzistas reciproka elrabado sub la protekto de la leĝo, kaj ĉio tio okazas tiom senhonte, tiom malkaŝite, ke oni ekteruriĝas pri la konsekvencoj de tiu socia stato, kiel ĝi tie senvualite prezentiĝas kaj oni miras pri tio, ke la tuta frenezo ankoraŭ kunteneblas.

Ĉar en tiu socia milito la kapitalo, la rekta aŭ nerekta posedo de la vivrimedoj, kaj produktadaj rimedoj estas la armilo, per kiu oni batalas, evidentiĝas, ke ĉiuj malavantaĝoj de tia stato falas sur la povrulon. Neniu homo zorgas pri la povrulo, puŝite en la kaosan kirladon, la povrulo devas trabaraktiĝi, tiel bone, kiel tio eblas. Se la povrulo tiom bonŝancas ricevi laboron, tio estas, se la kapitalisto gracas lin per tio, ke li pliriĉiĝas sin per la povrulo, atendas tiun salajro, kiu apenaŭ sufiĉas kunteni korpon kaj animon; se la povrulo ne ricevas laboron, restas al tiu la eblo ŝteli, se la povrulo ne timas la policon, aŭ malsatmorti. Kaj la polico ankaŭ en tiu kazo zorgos, ke la povrulo mortos je maniero ne ofendiga al la burĝaro. Dum mia ĉeesto en Anglio mortis almenaŭ dudek ĝis tridek homoj en plej ribeligaj cirkonstancoj rekte pro malsato, kaj ĉe la rigardado de la mortinto troviĝis nur tre malofte ĵurio, kiu havis la kuraĝon, elparoli tion publike. La eldiroj de atestantoj povis esti kiom ajn klaraj, kiom ajn sendubaj – la burĝaro, el kiu la ĵurio estis elektita, trovis ĉiam elirpordon, tra kiu ĝi povis fuĝi de la verdikto: la povrulo mortis pro malsato. La burĝaro en tiaj kazoj ne rajtas diri la veron, ĝi elparolus ja sian propran verdikton. Sed ankaŭ malrekte multaj – multe pli ol rekte – mortis pro malsato, ĉar la daŭra manko de sufiĉaj nutraĵoj kaŭzis mortigajn malsanojn kaj tiel voris siajn viktimojn per tio, ke ĝi tiom malfortigis ilin, ke certaj cirkonstancoj, kiuj

alikaze havus tute bonŝancajn rezultojn, necese devis rezultigi gravajn malsanojn kaj la morton. La britlandaj laboristoj nomas tion socia murdo kaj akuzas la tutan socion, ke ĝi seninterrompe deliktas tiun krimon. Ĉu ili ne pravas?

FREDERIKO ENGELS

*["La situo de la laboranta klaso en Britlando", p. 88. Diĝita Biblioteko Volumo 11: Marks/Engels, p. 10349 (komparu "MEW". Vol 2, p. 258)]*

*Tradukis Cez*

PS: Tion verkis Frederiko *Engels*, kiam li estis 23-jara kaj kiam li Markson ankoraŭ tute ne konis! Jen do frua verko de li, kaj des pli admirinda ĝi estas; cetere, estas multe da *B. Traven* en ĝi aŭ por diri ĝin pli ĝuste, en *B. Traven* estas multe da Frederiko *Engels*. La libro "La situo de la laboranta klaso en Britlando" estas por la kompreno de la *Traven*-romano "Mortula Ŝipo" tre grava. Ĝi estas eĉ la plej esenca fonto por la "Mortula Ŝipo"; kaj kelkaj gravaj frazoj en tiu libro de *B. Traven* kun nur malmultaj modifoj estas preskaŭ rekte transprenitaj el la libro de *Engels*. Do, en tiu senco, mi vere ne troigas, ke parte *Engels* estas eĉ la kunaŭtoro de tiu fama libro de *B. Traven*. (NdT)

*Originalo: http://www.ipernity.com/blog/cezar/141915*

SAT-ANOJ AKTIVAS

# SATeH en la kultur-depostula Madrido

La pasintan 19an de novembro, mi sendis al diversaj retaj E-forumoj jenan informon:

"La internacia junulargastejo *San Fermín*, de Madrido, estas konata de ni esperantistoj pro la simpatio montrata de ĝiaj gvidantoj al nia afero. Tie okazis, i.a. la 9a IRo (Iberia Renkontiĝo) en 2013. Ankaŭ la najbaroj de la kvartalo *San Fermín* rigardas la gastejon aktiva centro de kultura agado, de la kultura agado, kiun devus realigi –kaj ĝis nun ne realigis– urbaj kaj regionaj oficialaj institucioj. Unu el la plej malnovaj, konstantaj kaj fervore probatalataj depostuloj de la najbaroj estas la kreo de biblioteko. El la urbestro *Alberto Ruiz-Gallardón*, de la dekstra partio PP, ili ricevis nur belajn vortojn kaj promesojn. El la sampartia urbestrino *Ana Botella*, eĉ ne tion. Pasintjare, la gastejo aranĝis popolan konkurson de rakontoj pri la depostulata biblioteko. Du madridaj SATeH-membroj, *Mati Montero* kaj mi mem, estis elektitaj kiel ĵurianoj. Kiel bela sperto!

Antaŭ nelonge, la nuna magistrato, konsistigata de maldekstra koalicio sub la gvido de la juĝistino *Manuela Carmena*, aprobis la kreon de la sopirata biblioteko ne donante belajn vortojn, sed destinante monon por la projekto. Nur tiel projektoj efektiviĝas. Tiun bonan novaĵon la najbararo volas festi. Venontdimanĉe, la 22an de novembro, de 11:30 ĝis 14:30, ĝuste sur la parcelo, sur kiu oni konstruos la bibliotekon (*Avenida de San Fermín*, fronte al *Centro de Salud*, metrostacio *San Fermín-Orcasur*, linio 3) havos lokon modesta sed certe vibroplena festo. Muzikistojn, kantistojn, poetojn... la junulargastejo petis pri partopreno. Min honoris ricevi tian inviton. Plej volonte mi ĉeestos kaj deklamos (eble eĉ kantos) kelkajn poemojn en la hispana kaj en Esperanto. Ja tiuspecaj popolaj aranĝoj donas veran sencon al mia poezia laboro. Ankaŭ mia admirata engaĝiĝinta poetino *María Ángeles Maeso* [1] partoprenos. Ĉe la fino, la ĉeestantaron oni regalos per paelo. Ĉu ne bele, se pluraj el ni esperantistoj renkontiĝos tie?".

Kaj la festo okazis. La varmo el la koroj de la najbaroj sufiĉis por kontraŭbatali la froston, kiu antaŭ nelonge, surprize, transformis la printempecan aŭtunon de Madrido en antaŭaĵon de Julo. Por la unua fojo, post pli ol dudek jaroj da batalado por tiu justa kaj laŭdinda aspiro, magistrata aŭtoritato degnis viziti la kvartalon por turni sin al la bibliotek-depostulaj najbaroj. Temis pri *Celia Mayer*, magistratanino pri kulturo ĉe la madrida urbodomo. Post ol ŝi manifestis al ili sian apogon, *Mayer* ne povis kaŝi sian pozitivan impreson ĉe aŭskultado – verŝajne por la unua fojo – de esperantlingvaj versoj kaj kantoj.

Ambaŭlingve – hispane kaj esperante – mi deklamis kaj kantis tri poemojn, pri kiuj certe la k-doj ĉeestintaj la 86an SAT-kongreson en Madrido bone scias. Temas pri "La bona lupeto", de *José Agustín Goytisolo*, "Eraris, ve!, la kolombo", de *Rafael Alberti*, kaj "Kanto al la libero", de *José Antonio Labordeta*. Sed plie mi deklamis unu el miaj plej ĵuse verkitaj poemoj: "Amkanto far 'indigninta avĉjo' en batalo". Jen mi prezentas ĝin al vi post nepra enkuntekstigo, sen kiu ne eblus kapti politikajn-sociajn aludojn kaj la spiritan atmosferon, kie disvolviĝas la versoj.

En majo 2011, la hispana junularo ĉefrolis en unu el la plej gravaj kaj drastaj protestoj lastatempe okazintaj en Hispanio kontraŭ la nun regantan socian-ekonomian modelon. Inspirite de *Stéphane Hessel*, pere de lia libro *Indignez-vous!* (Indignu!), gejunuloj amase manifestaciis en diversaj hispanaj urboj kontraŭ la farson de la novliberalisma demokratio. Temas pri la t.n. "indignuloj". La indignuloj kolektiĝis en la ĉefaj placoj de la hispana teritorio kaj, spite minacojn kaj disajn atakojn far la polico, tie tendumis tage-nokte, organizis amasajn kunsidojn, kulturajn aranĝojn ktp kaj pruvis, ke alia mondo eblas.

Tiukadre, en la madrida Sun-porda Placo, kie la indignuloj tendumadis, ŝprucis ankaŭ indignulaj ĥoro kaj orkestro, alnomata "la Sunfonia". Laŭe al la skolo de la sveddevena usona anarki-sindikatisto kaj kantisto *Joe Hill*

(1879-1915) – kiel nin kortuŝis en la sepdekaj jaroj la biografia filmo *Joe Hill* (1970), de la sveda reĝisoro *Bo Widerberg*! – niaj popolaj muzikistoj ludas revoluciajn kantojn en manifestacioj kaj amasaj protestoj. Ni partoprenintoj en la 86a SAT-kongreso en Madrido estis tiel bonŝancaj, ke ni ĝuis la viziton de "la Sunfonia" kaj de la indignula ĥoro, kiuj emociis nin per diversaj juveloj el sia nepre engaĝiĝinta repertuaro.

Ne malmultaj alitempaj – nun jam oldaj – batalantoj kontraŭ la *Franco*'an diktaturon aliĝis al la indignulaj depostuloj kaj kritikoj kaj nun vigle kaj brave aktivas plue, kadre de kontraŭkapitalismaj protestoj. Temas pri la t.n. "indignintaj geavĉjoj". La sekva poemo estas mia lirika omaĝo al ĉi senlacaj batalantoj por la socia justo.

### Amkanto far "indigninta avĉjo" en batalo

Nun...
nun, kiam la futuro iĝis karno
kaj loĝas ĉe la mastroj
– ĉe la ĉiamaj mastroj –
de nia vivo. Nun...
kiam jam ekdoloras ostoj kaj grizaj haroj
kaj jam ekpik-doloras
ĉiuj eĥoj de tiom da forestoj.
Nun, kiam ni bedaŭras el la koro,
ke fine nia rev' ne estis ebla,
ke ĝi elglitis inter niaj fingroj.
Kaj ke ne estis ebla
vin vidi, am', aŭrori inter miaj brakoj
ĉe krakoj de raketoj kaj hupadoj
anoncantaj la horon de la popol-erao.
Nun, kiam buŝoŝtopas nin la leĝoj,
produktoj de ĉi farso, de ĉi tio
antipoda de l' lumo, por kiu ni batalis
kaj iomete mortis tiutempe.
Nun, tie ĉi, en fuĝo el la samaj
gumkugloj, el la samaj vergofrapoj,
el identa teror', inter la samaj
lamentoj, krioj kaj siren-aŭluloj.
Nun, tie ĉi, en emoci-vibrado
kun novaĵo ne tiel nova tamen,
kun la tutaj koruso kaj orkestro
de nuntempaj *Joe Hill*, kiuj min ravas
– kiel ni ploris tiam ĉe spektado
de tiu bona filmo!, ĉu vi memoras plue? – ...
De nuntempaj *Joe Hill*,
kiuj, meze de ĉi batalo urba,
neŝanceleble,
al ni fervore kantas oldajn himnojn
de *Paco Ibáñez*,
de *José Afonso*, *Llach* kaj *Labordeta*...
Nun, tie ĉi, ĉe ili,
ĉe niaj indignuloj kaj ĉe vi,
mi renovigas la esperon, ke finfine eblos
vin vidi, am', aŭrori inter miaj brakoj
ĉe krakoj de raketoj kaj hupadoj
anoncantaj la horon de la popol-erao.
Kaj dediĉas
mi al vi ĉi amkanton en batalo.

Miguel Fernández

[1] Prezento de la poezia figuro de *María Ángeles Maeso* kaj diversaj poemoj el ŝia poemaro *Vamos, vemos* (Ni iras, vidas), en traduko de *Miguel Fernández*, legeblas i.a. en Sennaciulo, n-ro 1-2 (1315-1316), Januaro-Februaro 2015 kaj en Sennaciulo, n-ro 3-4 (1317-1318), Marto-Aprilo 2015.







**Miguel Fernández**

# Pripensoj ĉirkaŭ mortopuno: ĉu aboli ĝin por kulpuloj kaj ĝin konservi por senkulpuloj?

Senkompromisa kontraŭulo al mortopuno, Roberto Badintero sukcesas ĝin aboligi en 1981 (ndt: en Francio). Jen temas pri mortopuno koncerne homojn.

Persone, mi konsentas pri tiu abolo pro kialoj konataj: perforto de fundamentaj rajtoj, nekorekteblo, risko pri justica eraro... Tamen, por vegano, ŝoke estas kompreni, ke en niaj socioj laŭdire "civilizitaj", mortigi homon juĝita kulpa pri gravaj krimoj estas malpermesite dum mortigi senkulpan kaj senthavan estulon estas permesata, kuraĝigita. Kondiĉe ke oni manĝas ĝian karnon aŭ survestas ĝian haŭton.

Same pri turmentado. Malpermesita (prave!) en kvazaŭ ĉiuj internaciaj leĝoj homaj, eĉ koncerne seksperfortulojn aŭ amasmurdistojn, ĝi estas larĝe tolerata koncerne nehomajn animalojn. Ekzemple en Francio. Besto, diras leĝo, devas esti mortigita sen suferigo. Vasta hipokritaĵo, kiel ankoraŭ montris antaŭ kelkaj tagoj hororaj bildoj sine de buĉejoj Alesaj (jam antaŭe plurfoje denuncitaj pro nekonformeco, neniam kun konkreta sekvo). Kiel pruvas ankaŭ la nekomprenebla escepto, konsentita al ritaj buĉejoj judaj kaj islamaj, al regulo pri antaŭbuĉa senkonsciigo. Kaj kiel pruvas ĉiutage la permeso kastri sen preparo, detranĉi vostojn, bekojn, elŝiri dentojn sen anestezo, dispremmortigi virajn kokidojn.

Ni memorigu, plian fojon, ke bovinoj, porkoj, kokidoj, ŝafoj breditaj kaj mortigitaj por ilia karno aŭ haŭto estas senthavaj estuloj kun propraj bezonoj, deziroj, emocioj, sociaj rilatoj, personaj karakteroj... Ĉefe estuloj kiuj, kiel homo, kapablas suferi; estuloj kiuj volas vivi sian vivon. Ili havas, almenaŭ iuj, konscion pri si mem, pri sia respegulaĵo, solvas testojn pri inteligenteco (kolomboj pri malfermo-sistemoj de skatoloj; porkoj montriĝas samlertaj kiel homidoj almenaŭ ĝis ili estas tri-jaraĝaj).

Bovidoj, ŝafidoj, ili ankoraŭ bebas. Ili almenaŭ senkulpas pri ajna krimo kontraŭ la homa specio. Homa specio, kies sano pli bonfartas kiam ĝi ne konsumas ilian karnon. Kiel eblas hodiaŭ daŭrigi akcepti la ideon, ke ilia sistema mortigo, ke maljusta pritraktado trudita al ili dum ilia vivo da enuo, senhelpeco kaj sufero, plu laŭleĝas, dum pritraktado de homoj turmentintaj, seksperfortintaj aŭ murdintaj siajn samulojn estas mildigita, enkadrigita, nu, humanigita?

Se vi estas karnisto (viando-manĝulo) kaj kontraŭulo al mortopuno, jen io meditinda.

LILI' GONDAŬA',

*24an de oktobro 2015*

*Fonto: http://www.vegactu.com/divers/reflexions-autour-de-la-peine-de-mort-labolir-pour-les-coupables-la-maintenir-pour-les-innocents-20999/*

*Ligo al la filmeto pri buĉejo en Aleso: http://www.l214.com/enquetes/2015/abattoir-made-in-france/*

*Tradukadaptis: Markovo-Vito 35521 pimskrabo@yahoo.fr*



# Letero de Sen Rodin al Leo Weber

24-10-2015.

Ĝentila S-ro *Leo Weber*,

kun surprizo mi legis vian korespondpeton en “Sennaciulo” de majo-junio 2015. Ĝis hieraŭ mi kredis esti la homo, kiu parolas Esperanton de plej multaj jaroj. Via letero sciigas min, ke vi superas min je tri jaroj! Fakte: mi naskiĝis en 1932, kaj en 1940 (8-jara) mi lernis Esperanton. Do mi (nun 83-jara) ekparolis Esperanton antaŭ 75 jaroj. Vi naskiĝis en 1923, kaj en 1937 (14-jara) vi lernis Esperanton. Do vi (nun 92-jara) ekparolis Esperanton antaŭ 78 jaroj. Mi sincere kaj admire gratulas kaj bondeziras al vi ĉion bonan, des pli konstatante, ke vi rezonas kaj skribas kiel junulo! Mi multe ŝatus ekscii kial kaj kiel vi lernis la lingvon.

Koncerne min: en mia familio ĉiuj (gepatroj, du fratinoj multe pli aĝaj ol mi, aliaj parencoj) parolis ĉiam en la bela veneta lingvo. Sed al mi – sola maskla filo kaj do “princeto” de la familio – oni trudis la italan lingvon kaj nur per ĝi oni alparolis min. Tio bedaŭrinde kaŭzis mian malsimpation al la itala lingvo. Tiam mia onklino *Mirza Marchesi*, pionirino de E-o en Italio, proponis instrui al mi E-on, kaj mi ĝoje akceptis. Ekde tiam mi sentas E-on mia unua kor-lingvo. Vidu la ŝercojn de la sorto!

Kun estimo kaj amikeco mi atendas viajn novaĵojn.

*Filippo Franceschi* (*Sen Rodin* estas mia plumnomo)
senrodin.eo@neomedia.it
tel. +39 0523-877034
Filippo Franceschi
Casale Veano, 9
29020 VIGOLZONE (PC)
Italio

# Honto kaj timo en Argentino

Post la balotado, la nova reganto en Argentino (*Mauricio Macri* – NdR) estas marioneto de la dekstrularo de Usono ktp.

La medioj, la ĵurnaloj, la televido ktp portis la “Radikalan” Partion al voĉdono kune kun la dekstra partio, kiel ĉiam, kaj al elekto de ĉi tiu hontiga ulo kiel prezidento.

Gajnis la riĉuloj, timas la malriĉuloj alian krizon kiel tiun, kiu okazis en la jaro 2001.

Ĉi tiu prezidento signifas unu kojnon de la dekstrulaj regantoj de la mondo en Sud-Amerikon.

Atentu, Sud-Ameriko!!! Ĉi tiu ulo pli-malpli kontrolata per la popolo ne havas bonan intencon kun vi nek kun la mondo. Atentu ankaŭ Irano, li rompos rilatojn kun ĝi. Ĉar ni havos malbonan volon, ni, kiel marionetoj de la dekstrularo de Usono, perdos estonte la bonajn rilatojn kun granda parto de la mondo.

Argentinanoj, la unika solvo estas: se vi scias, preĝu!!!

*Nélida Beatriz Monasterio*
Bolívar – 24/11/2015

## Mesaĝo por la Internacia Virina Tago 2016, Hiroŝimo

Ni, Hiroŝima Esperanto-Centro kiel unu el 22 organizoj sub la Plenuma Komitato de Internacia Virina Tago 2016 Hiroŝimo, sendas al vi mesaĝon. Ni petas vin doni al ni vian respondan mesaĝon por la Tago, kaj transdoni nian mesaĝon al viaj geamikoj, viaj asocioj. Ni ekspozicios vian mesaĝon ĉe publikaj ejoj de la urbo Hiroŝimo, kaj prezentos en la kunveno de la Tago.

Kun antaŭdanko,

OSIOKA Taeko

Mesaĝo por la Internacia Virina Tago 2016, Hiroŝimo

Estimataj, kaj karaj gesinjoroj en la mondo,

Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago de UN 2016 Hiroŝimo, konsistante el 22 organizoj kaj la municipo Hiroŝimo, salutas vin solidarece, kaj elkore alvokas al vi. En la 8-a de marto, 2016, por la Internacia Virina Tago de UN, ni havos kunvenon por kunlaboro per saĝoj kaj fortoj, kaj antaŭenpuŝi konstruon de la socio por komuna partopreno de geviroj.

Virinoj de la gubernio kaj de la urbo Hiroŝimo organizas kunlaborojn por heredigo de la socio paca al sekvanta generacio. Nur en paco ni povas koncentri fortojn por antaŭenpuŝo de komuna partopreno de geviroj.

Hodiaŭ ni alfrontas krizon de ĉena reago de teroro kaj venĝo post la malvarma milito post la dua mondmilito, kaj ni demandas pri nia mondkoncepto en abundaj informoj. En 2015 la Japana registaro ŝanĝis elektoleĝon por publikaj oficoj, por ke ekde 18 jaraĝaj homoj havu la voĉdonrajton. Gravas ke, ni mem kiel suvereno elektu la ĝustan informon pri la socio por prijuĝi kaj praktiki la rajton.

La temo de Internacia Virina Tago de 2016 estas "La estontecon malfermas ni mem. Trovu la veron el abundaj informoj." En la tago ni aŭskultos prelegon de ĵurnalisto de Japana Ĵurnalista Asocio pri la nuna situacio kaj taskoj de ĵurnalismo, por ke precipe juna generacio povu praktiki sian voĉdonrajton kaj malfermu sian estontecon, kaj kune ni pripensos pri elekto kaj agado al vere paca mondo.

El la atombombita urbo Hirosimo ni alvokas ĉiujn en la mondo al ne perforta solvo de la problemoj por paco.

Bonvolu doni vian opinion por nuligi nuklearmilon kaj militon, ni petas. Vian mesaĝon ni ekspozicios en kunvenejo de la urbo.

S-ino MATUMURA Aiko

*Prezidanto de la Plenuma Komitato por la Internacia Virina Tago 2016, Hiroŝimo*

Limdato kaj aliaj: la 10-a, februaro 2016.
Kun notoj petataj: Nomo, sekso, aĝo se eble, profesio, loĝloko (urbonomo), lando.
Sendu al: OSIOKA Taeko osioka@mua.biglobe.ne.jp
Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hiroŝimo, 734-0041 Japanio

# Pri la Unua Mondmilito

Teamo de kamaradoj nun prilaboras tekstojn por eldoni libron pri Unua Mondmilito kaj, kiam eblos, Esperanto. Oni bonvenigos ĉiajn sugestojn. Speciale ni alvokas plej veteranajn kamaradojn por ke ili respondu libere al tiuj demandoj:


a) Por ke oni povu kompreni viajn respondon bv. diri al ni ion pri via deveno (almenaŭ, naskiĝloko kaj naskiĝjaro), via infanaĝo, via familia etoso, via socia klaso, via profesio, ktp.
b) Poste bv. diri al ni ion pri via rilato al Esperanto, kiam vi esperantistiĝis, pri kio vi okupiĝis ktp.
c) Kion vi memoras pri la Unua Mondmilito aŭditan en medio ĉu de la familio aŭ de konatuloj (ne el libroj)?
d) Bv diri al ni ion pri la influo de la mondmilito en la cetero de via vivo (aŭ de viaj konatuloj/familianoj).
e) Ĉu vi volas aldoni ion?

El la ricevita reagaro ni aranĝos specifan tekston, nome memorojn de esperantistoj. Sendu ilin al saliko69@hotmail.com aŭ José Salguero. Rena 11 bajo derecha. ES-06400 Don Benito, Hispanio.

Dankon,

Kani

# La Ĉevalo de Motizuki




Mi tuj aprezis la legeblecon de la muziko-libreto kaj ĝian aspekton; ĝi simple, bele, kvazaŭ naive prezentiĝas. Allogas ankaŭ la japanaj skribaĵoj kaj scivolemigas min la ĉevalo ĉe la paĝkovrilo. Jam tiu aspekto situigas la kuntekston de la rakonto.

La titolo « La Ĉevalo de *Motizuki* » popollegende fabele sonas. La muzikokomponaĵon komponis en unu jaro (1988) la aŭtoro *MIKI Minoru* en la ĝenro « korusa suito » en piana versio; ankaŭ por ĉefa kaj kromaj rolantoj. Tiu muziko-komponaĵo alirebla per amatora kvarmiksa koruso dum 35 minutoj japan-spirite lokigos vin en *Mimaki*, okcidenta herbejo *Komoro*.

Kiel ofte, sed ne nur en Japanio, kvankam tio rilatas al japana sentemeco, la popolaj rakontoj implikas, en strangaj situacioj, bestojn dotitajn de supernaturaj povoj.

Dum mi malkovris la muzikon, la preludo plenigis mian spiriton de tipe japana ripozega pejzaĝo: nesekaj montetoj ĉe la horizonto, verdiĝantaj valoj... La piano-ludo iĝis bambua fluto, ondumada herbejo de milda zefiro flustris dolĉan melodion, mi revis! Oldulo rakontis tion, kion rakontis la avo... Iam okazis... Aminda princino *Ikoma* (Vivĉevalo) samtage naskiĝis kiel la mita virĉevalido *Tukiĝe*. Gratulinda situacio por la popolo de la herbejo de *Mimaki*. Harmonie *Tukiĝe*, kaj ameme *Ikoma* travivis pacan kaj riĉan vivon.

La preludo-temo plurfoje reaperos en la muziko-rakonto.

Kvankam nuntempa komponaĵo, la prezentita muzika skribaĵo klasikas. La muzika stilo ofte uzas ostinatojn [1]. La muziko bone subtenas la rakonton, ĉu recitative-epizode, ĉu tambure pripensigante galopojn, ĉu arpeĝe laŭ kunteksto. Ne ŝokas la nekutimaj moduladoj (laŭ la regularo de klasika harmonio) en tiu legenda kunteksto. La unisonoj ne inspiras monotonecon sed malpaciencon pri la kreskiganta suito de la fabelo.

En tiu donaca periodo de la jarfino indus rakonti tiun legendon apud la kameno aŭ donaci ĝian registraĵon se ĝi ekzistus.

Mi verkis tiun recenzon laŭ mia persona sentemeco kaj eŭropa kulturo.

Franjo


[1] Ostinato: ritmaj kaj melodiaj ripetitaj movoj.

# Enigmoj

## Solvoj

**Stranga ĝardeno**

Por solvi tiun problemon, vi devus pensi pri la insigno de Esperanto: la verda stelo. Se por vi ne estas sufiĉe klare, rigardu la desegnon.



**Divenu...**

Mi tutsimple havas truon en mia poŝo!

**Sekreta kofro**


Por sukcesi, oni devas unue iomete pripensi, kaj due provi meti la ciferojn. La du centraj lokoj tuŝas 5 aliajn ĉelojn, do oni nepre devas meti ciferon, kiu havas nur unu najbaron, do la 1-an kaj 8-an. Poste estas pluraj solvoj, mi montras al vi unu, kiu taŭgas.

| | | |
|---|---|---|
| | 7 | |
| 3 | 1 | 4 |
| 5 | 8 | 6 |
| | 2 | |

## Novaj enigmoj

**Detranĉado**

Jen rektangulo, kies flankolongoj estas 2 kaj 4.



Kiel detranĉi tiun rektangulon por krei kvadraton kun la sama surfaco?

**Satana malsano**

Tiu enigmo estas klasika, kaj sendube iomete pli malfacila ol la kutimaj enigmoj, sed mi ŝatas la respondon, ĉar ĝi uzas tre komunan logikan pruvon. Ĉar mi ŝatus, ke vi iomete lernu pri logiko, mi proponas tion al vi.

Imagu SAT-kongreson, sed iomete strangan. Mi priskribos ĝin al vi.

Dum tiu SAT-kongreso, oni lernas, ke almenaŭ unu SAT-ano estas malsana. Tiu malsano ne estas kontaĝa, do la nombro de malsanuloj ne evoluas. Sed la malsanulo(j) devas foriri. Kiam iu estas malsana, li havas ruĝan makulon sur la frunto – tiel oni povas facile scii kaj vidi, ke li estas malsana.

Sed la problemo estas, ke nenie en la SAT-kongreso estas spegulo, do la SAT-anoj ne povas vidi, ĉu ili havas ruĝan makulon aŭ ne. Kaj kiel mi diris al vi, estas tre stranga SAT-kongreso, do la SAT-anoj ne rajtas paroli inter si pri tiu malsano kaj ĉiuj kongresanoj kapablas logike rezoni.

Ĉiumatene estas kunsido, kiun kompreneble ĉiuj SAT-anoj ĉeestas por efike labori! Tiam ili povas vidi unu la alian, sed ne babili pri tiu fimalsano! Post 5 tagoj ĉiuj malsanuloj foriris.

Partoprenis la kongreson 53 SAT-anoj. Kiom da malsanuloj ĉeestis ?

Diana Riŝar

# La libero kiun ĝuas la kapitalo dispremi la laboriston

**Recenzo pri libro eldonita de MAS (Monda Asembleo Socia) en 2009: Karlo Markso "Pri Liberkomerco" – 1848, kun antaŭparolo de Engels – 1888 (ISBN 978-2-918300-02-1). Esperantigita de Vilhelmo Lutermano.**

La verko konsistas el parolado, kiun *Marks* faris en la kunteksto de la de ĉiu histori-lernolibro bone konata batalo pri "*Corn Laws*" en 1846, batalo de la "liberaluloj", tio estas la kapitalistaj industriistoj anglaj, kontraŭ la "konservativuloj", tio estas, ne la agrokultivistoj – vere tiu klaso ne ekzistis en Anglio – sed la granda terposeda nobelaro, sed samtempe, kiel konstante, kadre de la klasbatalo kontraŭ la tute senposeda angla laboristaro!

Estas libro enradikiĝita en la historio de la 40-aj jaroj (la 1840-aj!), sed samtempe universale trafa pri la konstantaj rimedoj de la kapitalisma klasbatalo, kaj ties kutimo artifike mensogi kaj manipule amase propagandi (vidu la bildon) sub ŝajne homamaj pretekstoj, kaj hodiaŭtage reiĝinta aktuala! (tial legu!), kaj komprenigas la veran naturon de la nuntempe tiom admonita, tiel nomita "tutmondiĝo".

Mi ne komentos ties trafecon, nek la agrable viglan kaj ironian stilon de *Marks*, tre malproksima de la ideo doktora kaj teda, kiun oni volas imagigi al ni de *Marks*! Sed faros rimarkojn pri nur du aferoj:

## 1. La plej trafa estas la cifera!

Jes, tiom grava kaj informpeza, kiom la tuta cetero de la libro estas la paragrafo (p. 31), kie *Marks* eksciigas al ni finfine konkrete, post tiom da historiistoj, kiuj proponas al ni nur vortojn, post kiuj ni ankoraŭ komprenas nenion pri la vivo kaj konkretaj evoluoj de la epokoj, *kiom* da ŝilingoj pergajnis en semajno la teksistoj en 1815, kaj en 1843. Mi lasas al vi malkovri kiom (he! truko por sproni la scivolon!), kaj, ĉefe, imagi kion tioma malkresko de vivrimedoj – vi kiuj ektimas, kiam vi, prave! mi ne estas sofisma porkapitalisto, strikas pro perdo de 2% en la aĉetpovo – implicas en la vivo de la *homoj*, kiuj estis tiuj vivantaj individuaj personoj de Anglio kaj ties familioj.


## 2. La realo eĉ superas la fantazion!

En amaskunveno laboristo ekkriis: "Se la terproprietuloj vendus niajn ostojn, vi fabrikistoj estus la unuaj, kiuj aĉetus ilin, por ĵeti ilin en vapormuelilon kaj farus el ili farunon." He! la angloj ja tion faris! En "Viditaĵoj" (*Choses Vues*) *Victor Hugo* notis: "5-a de decembro 1847 – La anglaj gazetoj raportas, ke alvenis en la haveno *Hull* pluraj milionoj da buŝeloj da homaj ostoj, kolektitaj sur la batalkampoj de la Napoleonaj militoj. [Tiuepoke oni ne kreis memorejojn kiel en *Lorette*, nek eĉ militistajn tombejojn por la viktimoj de la militoj.] Ĉi tiuj estis transportitaj en Jorkŝiron, kie oni ilin pistis, kaj sendis al *Donkaster*, kie oni uzas ilin kiel sterkon por agroj." Fakte, kiel oni bone scias, la tiamaj anglaj komercistoj faris same kun la mumioj de sakralaj katoj malkovritaj en Egipto. Kaj nuntempe estas farata, en la tuta mondo, komerco kun la korpopecoj de abortigitaj infanoj. Jes ne nur la nazioj. Estas la spirito de la moderneco, kiel dirus *Zygmunt Bauman*.

Kaj konklude – ĉar mi rememorigas, se vi iel ankoraŭ dubus, ke tio estas ne nur "klasikaĵo" de la politika penso, sed pripensiga kaj denove aktuala libro – mi metus la demandon: ĉu la cinika kalkulo *Engels*-a de 1888 pri la liberkomerco kaj revolucio – (esti por, ja paradokse por, la liberkomerco, ĉar tiu pliigos pli rapide la malbonojn de la kapitalisma sistemo, kaj kreos pli da mizero, tial akcelos la venon de la saviga revolucio) – ne returniĝis inside kontraŭ la socialistoj? Kaj anstataŭ konduki la kapitalisman sistemon en por ĝi pereigan sakstraton nur ebligas al transnaciaj firmaoj (tio ne ekzistis en la tempo de *Marks/Engels*) maksimumigi siajn profitojn (kaj, do, ekspluatadon) kaj konstrui sian "belan sonĝon": la Nova Mond-Ordo (NWO), kiu igos ilin mastroj de totalisma kapitalisma tuttera diktaturo?

Plia pripensigo por la libro.

Roland Platteau



**Unu el la amaskunvenoj aranĝitaj por la propagando liberala kontraŭ la « Corn Laws », en1846 (fonto : Vikipedio)**

# Templo de la Kulpuloj

Du trampaj figuroj, vira kaj virina, videblis horizonte. Ŝajne ĝuste por la pli bona videblo la sombra kaj rekta zenito iom diafanigis la densan vesperan aeron. La lumo, entute, ludis nekutime bizare. Jen kial deflanke ĉio tiam povintus prezentiĝi sufiĉe sublime, kaj povus ekŝajni ke tiuj homaj siluetoj en formo de la nigraj makuloj drivas en la senlima ruĝluma maro laŭ la trajektorio difinita iam antaŭe, sed kies linioj interplektiĝis por eltiri el iaj altaj sferoj de la fata sorto, paradokse najbaranta al la hazardo, sian krudan projekcion aspekte de la kerna ĉi-tiea vojo, kiu iris el la stepoj tra la apuda vepraro kaj trans la verdajn akvofaletojn, kiuj jam dum kelkaj minutoj neimageble bele harmoniis kun la sunsubira pejzaĝo.

Sed eĉ por la vagantoj, realvide, ili simple maldistre paŝadis sur la sinua malseka padeto, dronante en la koto ŝlima, jam dum multaj tagoj. Tial ambaŭ ili laciĝis kaj jam dumlonge volis manĝi, sed neniu emis montri tion, ĉar tio neeviteble memorigus pri la manĝeblaĵoj al tiu, kiu, eble, pensis pri io alia ĉi-momente.

Ĉiuj panetoj dolĉaj jam estis formanĝitaj je komenco de la vojaĝo kaj ilia stoko, sendube, repleniĝos nur post kiam ili ĝisiros la templon. Tiu Templo de la Kulpuloj, en kiu eblis per la certaj ritoj realigi la plej gravan kaj sakralan deziron de la vivo, allogis multajn pilgrimulojn en la tuta mondo, eĉ malgraŭ tio ke neniu ĝuste sciis kie precize ĝi troviĝas. Laŭonidire, ĝi situas ie meze de tiu ĉi infinita ebenaĵo. Kaj do, ili paŝadis sur ĝi.

Ĝojigis nur tio ke la suno ne plu ĝenis kaj eblis almenaŭ spiri sen-embarase. Eĉ la malsato komencis ne tiel akre piki la mensojn. Plie, restis sufiĉa stokkvanto da akvo, minimume por du plenaj tagoj.

Se konsideri kiom da kilometroj estis jam antaŭe, la viro aspektis vigla. Lia mimikoplena vizaĝo eĉ se, milddire, ne freŝis, do klare brilis per iu interna forto. Ne eblis aserti ke la posedanto de tia vizaĝo estas mortige subpremata per ajna longega vojo. Male, eblis konkludi ke tiu ulo simple eliris por promeni piknikocele kun sia amata edzino je la dimanĉa posttagmezo, sed venonttage post la antaŭtaga vesperfesteno. (Des pli tiel eblis konkludi pro la pli-malpli sama aĝo de la du kunirantoj, – rimarkeble, ne tre granda aĝo, eble nur 40-45 jaroj.) Certe, se intence fiksrigardi, evidentiĝus ke la laciĝsignoj ja fontis el ĉiuj liaj trajtoj. Mallumaj areetoj sub la okuloj, nerazita barbo, ne plu memfida, senaplomba irmaniero, sub la premo de la dekkilograma tornistro ĝibe premita dorso klare atestis pri tio ke la vojo ne facilis. Lia kaduka vestaĵaro estiĝis tute polva kaj la kolore velkinta ronda ĉapeleto, iam flava, kaŭzis la kompaton. Finfine, tion ne eblis kaŝi, nek redukti. Sed ĉion transformadis al la flanko de bona impreso liaj okuloj, kiuj, donante tiun esprimoplenan rebrilon de la forto, videble konsciis ke ĉio superita ne estis vana kaj ke baldaŭ, eble jam post tiu ĉi nokto, la celo tiel atenteme kaj karese pritraktata en la revoj baldaŭ estos atingita. Je tiu okazo, ĉio ŝanĝiĝos, sendube.

La virino strebis teni sin trankvila. Tamen la antaŭĝuo de io gravega videble igis ŝin nervozeti. Tio manifest-iĝis per iuj superfluaj movoj de manoj kaj per la ĝenerale emociiĝa parol-maniero, – pli ĝuste per aparte emocie kolorita voĉo, kiu, se komenci maski tion, ĉiam fariĝadis eĉ pli vibrotrema. Cetere, ŝi ne ofte parolis. Pligrandan parton de la vojo oni marŝis silente, nur fojete interŝanĝante per la replikoj ne multe signifaj.

Ŝi ja estis bela. Rektaj kaj geometrie senriproĉaj vizaĝ-trajtoj modlis la unikan superbecon, malgraŭ ke ĉiuj konsistigaĵoj: frunto, brovoj, okuloj, nazo, estis tute ordinaraj. Maronkolora densa hararo ĝis la ŝultroj, maldensa kvazaŭ porcelana kolo, iom dika, sed proporcie alloga figuro, – ĉio konsist-igis la ĉefan ĉarmon. Tamen, la vestaĵo, preskaŭ ĉifona, nivelis ĉiujn ŝiajn noblajn kaj malnoblajn flankojn. Ŝorto fariĝis tute malpura kaj la T-ĉemizo aspektis tiel, kvazaŭ ĝi estus surhavata dum plena jaro senĉese: eĉ la truetoj aperis.

Sed ĉio tio estis fora de lia atento: videble li firme fiksis sian menson kaj ĉiujn fortojn proprajn je la vojaĝo, atendante ion ekstreme gravan de ĝi.

Dume la krepusko, kiel silko, komencis kovri solajn piedirantojn, kiuj jam komencis tedsenti pro la taga veluro kaj pro la sunaj dornoj. Eta vento balancis la kapojn de la ĉevojaj violkoloraj floroj. Jam alvenis la tempo por pripensi kiel nokti, kaj ŝajnis ke ĉio mergiĝis al la nekutima balzame favora silento. Eĉ iuj steloj eliĝis surĉiele, disĵetinte sin ĝis nun tro maldense, kvazaŭ timante ke la nokto ankoraŭ ne plene potencas. Supozeble, ankaŭ morgaŭ devontus suni. Morgaŭ estos malfacila tago, eble unu el la plej malfacilaj el tiuj, kiujn ili iam ajn havis. Jes, morgaŭ la vojaĝo finiĝos kaj, se ne mensogas homoj, la templo montros sian situlokon.

Subite la kunirantoj ĉesis iri.

— “Halt!” – klare diris la virino kaj prepariĝis eltiri ion el la sako.

— “Kio?” – la timo ial ekbrilis kaj tuj denove kaŝis sin en liaj okuloj. Li ekpensis ke ŝi ekvidis skorpion.

— “Kio okazis?” – demandis la viro pli-malpli feble. (Li, malgraŭ ĉio, videble, jam sentis dormemon.)

Anstataŭ respondi, ŝi fulmrapide eligis firman, rimarkeble ŝlifitan ŝtonon, kiu, ne estante granda, komfortege sidis enpolme, kaj abrupte frapis, per ĝusta forta frapo, rekte al tempio de la viro. Ĉio okazis je duonsekundo. La sango ekfluis. La viro malgracie eksidis sur la polvan vojon kaj ĉirkaŭbrakis la sangan kapon. Li nur konstante apenaŭ aŭdeble ripetadis: “Pro kio?... Pro kio?...”

Post iom da tempo li tro malfortiĝis kaj ne plu kapablis teni la kapon. Plejverŝajne, li perdis konscion. La virino komprenis tion kaj sekure alproksimiĝis. “Grandofero bezonatas...” – murmuris ŝiaj lipoj. Ŝi trenis la duonkadavron al la vojrando, elparolinte: “Tien ĉi! Jes... Perfekte”. Ankoraŭ varma herbo ĉirkaŭis ilin du per la dolĉaj odoroj kaj molaj karesemaj tuŝoj.

Ŝiaj okuloj strange ekbrilis. Elteninte tranĉilon el la sako de viro, la virino komencis flustri, produktante la sonon kvazaŭ el la plej funda punkto de la korpo:

*“Per damnitam Resonom,*
*Perdizzintam Horzonom,*
*Ex ityu nigram Tombeyom,*
*Phetoregam Ophitzeyom,*
*Pridpensantœ Miracloyn,*
*Trapasantœ Obstacloyn,*
*Tra inpheram Deymom,*
*Ed denowœ adi Heymom.”* [1]

Tio ŝajnis terura kaj abomena. Per la artifika frapo (eblus pensi ke ŝi faras tion ĉiutage), sen ajna ombro de hezito, la mortigintino komencis tranĉaĉi la viktimkorpon. Sed ŝi faris tro multe da superfluaj movoj, ne tre lerte regante la tranĉilon. La virino preskaŭ rabiis...

Nur post kelkaj dekoj da minutoj eĥis la ĝojkrio.

“Ĝuste vin mi bezonos morgaŭ!” – ŝi amemе, kvazaŭ bebon, envolvis per malpuraj kaj sange gluecaj manoj la viran koron al iu ĉifono. Zorgeme ŝi metis la envolvitan sangaĵon al la saketo, kie jam kuŝis ok malgrandaj, kovritaj per la balzama pulvoro, sekaj koroj de infanoj malaperintaj. Renverse turninte la sentripigitan kadavron, tiel por ke ĝi kuŝu vizaĝfronte al grundo kaj gape admiru samtempe honton kaj gloron de la tero, la juna virino, siavice, ekkuŝis sur dorso kaj komencis rigardi al la jam nokta stelaro. La naturo daŭre indiferentis, ne kapablante nek dividi la ĝojon, nek kompati la mortinton. Ĉio kaj ĉiuj poiome faladis al la densan, kiel eterneco, dormon.

Kapo ŝia estis libera je ajnaj pensoj. Tiu ino jam pretis alfronti la novan tagon kaj ŝi sciis kion fari kaj kion atendi de tiu tago.

Evgenij Georgiev (Espopore)

[1] “Per damnita resono,
Perdiĝinta horzono,
El la nigra tombejo,
Fetorega oficejo,
Pripensante miraklojn,
Trapasante obstaklojn,
Tra infera Dejmo,
Kaj denove al hejmo.”

*Tie ĉi estas uzata tiel nomata Arkaika Esperanto (*Arcaicam Esperantom*), fikcilingvo, planita dialekto de Esperanto kreita de Manuel Halvelik (kaŝonomo de Kamiel Vanhulle) kun la celo redoni la etoson de arkaika lingvo, pralingvo de Esperanto.



# Novaj aliĝoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| 36030* | DARBOIS Nelly | FR-73230 SAINT-ALBAN-LEYSSE | Francio |
| 36031* | COQUISARD Raymonde | FR-77250 MORET-SUR-LOING | Francio |
| 36032 | LIEWER Paul | US-MI 48176 SALINE | Usono |
| 36033 | STARLING Ĝan Ŭesli | US-MI 49460 WEST-OLIVE | Usono |
| 36034 | PHELAN Gerry | AU-2259 DOORALONG-NSW | Aŭstralio |
| 36035 | BIDAULT Francis | FR-81500 CABANÉS | Francio |
| 36036* | LEE Minja (Viola) | KR-143-769 SEOUL | Koreio |
| 36037 | KERR Christopher | DE-22763 HAMBURG | Germanio |
| 36038 | RUIZ José Roberto | BR-14021-520 RIBEIRÃO-PRETO-SP | Brazilo |
| 36039* | HUZIMOTO Hideko | JP-509-7605 GIFU-KEN-ENA-SHI | Japanio |
| 36040 | BALAZ Peter | SK-95804 PARTIZÁNSKE | Slovakio |
| 36041 | CROCE MARTINEZ Lautaro Manuel | AR-5533 MENDOZA | Argentino |
| 36042 | BRANDINI Michael | US-NY 10025 NEW-YORK | Usono |
| 36043* | RAO Jian (Sanoza) | CN-330000 JIANXI-NANCHANG | Ĉinio |
| 36044 | PENK J. Andreas | DE-13051 BERLIN | Germanio |
| 36045 | MORIERA FIANS Guilherme | GB-M14-6HX MANCHESTER | Britio |
| 36046* | CHEIZOO Korine | NL-2728-BT ZOETERMEER | Nederlando |
| 36047 | KOLGANOV Andrei | US-IL 60467 ORLAND-PARK | Usono |
| 36048 | BALDELLON Olivier | FR-69003 LYON | Francio |
| 36049 | LEROUX Olivier | FR-80300 MIRAUMONT | Francio |
| 36050 | LA FORGIA Andrea | IT-50123 FIRENZE | Italio |

# Landaj perantoj

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete : fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1 , BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916
Rete : cglady@arcadis.be
Bankkonto : 750-6373051-18
IBAN : BE 50 750-6373051-18
BIC : AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Ivica Horvat
Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino
rete : ivica.h@hs-hkb.ba
**Brazilo** – José Joaquin Lunazzi
R. Manoel Antunes Novo, 668, BR-13084-157
Campinas-SP., Brazilo
rete : lunazzi@esperanto.cc
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel. : +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete : ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403
rete: mam1948_ĉe_abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉeĥio** – Vaclav Stiburek
J. Franka 1731 , CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
rete : stiburek.v@seznam.cz
**Danio** – Ulrik Rasmussen
Nørregærdsvej 66, DK-2610 Rødovre, Danio
rete : sonjaogulrik@gmail.com
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
27000 EVREUX, Francio
rete : barthelemy.maurau@free.fr
Poŝtkonto : SAT PERANTO n-ro 17 333 10 N, Paris
**Germanio** – Dominik Schramm
Möhringer Straße 43, DE-70199 Stuttgart, GERMANIO
rete : dominik.schramm@gmx.net
senpagaj internaciaj ĝiroj eblas rekte al la konto "SAT" ĉe "La Banque Postale, Paris" :
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC : PSSTFRPPPAR
**Hispanio** – Pedro Maria Sanz Sanz
C/Mar de Fora 13, esc.izqda., 3-B, ES-28400 Collado Villalba, Hispanio
rete : pedrosanzsat@gmail.com
Konto : 0227-0001-85-0200526929 - banko apartenanta al BBVA
IBAN: ES04 0227 0001 8502 0052 6929
BIC: UNOEESM1XXX
**Italio** – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) , Italio
rete : carlo.bourlot@gmail.com
Tel. : 011-39.70.477
Poŝtel.: (+39) 327-327 3993
Poŝtkonto : n-ro 43976158
Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,
Kodo BIC : BPPIIRRXXX
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete : b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daishin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003, Tokio,
rete: dsn@k2.dion.ne.jp
Poŝtkonto : 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F)
Suji-Gu
KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do
rete : paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ
Otok Brac, HR-21414 Gorni Humac, Kroatio
Tel : +385.21 .647.059
Poŝtel : +385.098.182.79.07
rete : ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Poŝtkonto : 3200129804 Splitska banka
**Litovio** – Gražina Opulskiene
Tylioji 32-22, LT-89307 Mažeikiai, Litovio
rete : grazopul@yahoo.com
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete : llrespr@libero.it
IBAN : MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
**Portugalio** – Manuel Luis Pedrosa Alves
Estrada Principal, 79, Morelinho, PT-2710 Sintra, Portugalio
rete : ml.pedrosa@netcabo.pt
**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete : nikolao@orc.ru
**Serbio** – Tereza Kapista
Studentska 39/23, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete : tereza.kapista@ptt.rs
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete : ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
**Svisio** – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete : rischneller@gmail.com
Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
**Tajvano** – CHO Chaoming
12F2, No. 41 , Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung
rete : cmcho@so-net.net.tw
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete : classs@bigmir.net
telefone : 380 67 99 470 03
**Usono** – Brandon SOWERS
2341 Jefferson Dr, US-GA 30350 SANDY SPRINGS, Usono
rete : nigrakajrugxa@gmail.com
Konto #631382, ĉe kredit-unuiĝo "Spire".
**Aliaj landoj**
Adreso de SAT-Sidejo.
Poŝtkonto : 1234 22 K Paris
rete : kontakto@satesperanto.org
eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA : satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal:financoj@satesperanto.org

# Kotizoj 2016

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 27 € | Japanio | 7000 JPY |
| Aŭstralio | 52 € | Kanado | 81 CAD |
| Aŭstrio | 52 € | Koreio | 33 € |
| Barato | 12 € | Kroatio | 12 € (90 HRK) |
| Belgio | 52 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 10 € | Litovio | 12 € |
| Brazilio | 22 € | Malagasio | 5 € |
| Britio | 45 GBP | Makedonio | 5 € |
| Bulgario | 12 € | Malio | 5 € |
| Ĉeĥio | 20 € | Mongolio | 12 € |
| Ĉinio | 45 CNY | Meksikio | 15 € |
| Danio | 52 € | Nederlando | 52 € |
| Estonio | 12 € | Norvegio | 52 € |
| Finnlando | 52 € | Pollando | 12 € |
| Francio | 52 € | Portugalio | 30 € |
| Germanio | 52 € | Rusio | 12 € |
| Grekio | 5 € | Serbio | 12 € |
| Haitio | 5 € | Slovakio | 12 € |
| Hispanio | 40 € | Slovenio | 12 € |
| Hungario | 12 € | Svedio | 52 € |
| Israelo | 32 € | Svisio | 79 CHF |
| Islando | 33 € | Ukrainio | 12 € |
| Italio | 50 € | Usono | 74 USD |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

*Sennaciulo*
Oficiala organo de SAT

**Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Poŝtkonto:*
SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org
**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Sekretario:* Diana Riŝar
*Kasisto:* Bruno Henry
*Membroj:* Guy Cavalier, Franjo Lévêque, Pedro Sanz, Dominiko Simeone
**Sennaciulo**
*Redaktoskipaj kunordigantoj:* Vinko Markovo, Pedro Sanz
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale.
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 39 €
Autres pays/*aliaj landoj:* peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 20 G 86567

> Nura abono al Sennaciulo: 75 % de la plena kotizprezo por la koncerna lando.
> Por la nemenciitaj landoj la aliĝo al SAT estas 5 € kaj la PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.
> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo
> El la indikita sumo, 40 % estas la kotizo kaj 60 % la abono.
> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.
> Pagante la sumon aparte indikitan, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.
> La kotizo estas pagenda al: poŝtkonto n-ro 1234-22 K Paris, aŭ la landa peranto de via regiono.

# Donacintoj

## Solidarkaso

HAUPT Rainer______________ 8,00 EUR
GIRARD Véronique________ 53,00 EUR
REDOULEZ Marcelo________ 3,00 EUR
NOURMONT Claude______ 296,00 EUR
BRESLER Lucien_______________ 8,00 EUR
KNOEFERL Franz_____________ 96,00 EUR
JANKOWSKI Hans Johannes____ 8,00 EUR
DE WITH Bert_______________ 48,00 EUR

## Helpfonduso kongreso

HOROSHILOV Aleksandro__ 20,00 EUR
BIURRUN Ricardo_________ 60,00 EUR
LLOYD FORD James________1519,76 GPB



Post la parizaj atencoj (paĝoj 9-14)



Palestino: okupado kaj lingvaj konfliktoj (paĝo 15)



SATeH en la kultur-depostula Madrido (paĝo 21)

# 89a SAT-kongreso

16a-23a de Julio 2016 Herzberg am Harz

## Ekskursoj

Aliĝilon vi ricevis kun la septembro-oktobra Sennaciulo.
Reta aliĝo tra la kongresa retejo: http://sat89.esperanto-urbo.de/
Sendu prefere skanitan kopion de la aliĝilo al "financoj@satesperanto.org".
Kaze de neeblo, sendu paperan kopion al la sidejo de SAT.
Pago: prefere ĝiru la monon al la poŝtkonto de SAT (detaloj en p. 30) aŭ al Konto de SAT ĉe UEA: satx-s.
Francan bankĉekon sendu al SAT-ESPERANTO, 67 avenue Gambetta FR-75020 PARIS FRANCIO.

### Goslar kaj la Harz-montaro: DT1 - 17.07.2016, dimanĉo

La Harz-montaro allogas per siaj belegaj pejzaĝoj, historiaj urbetoj kun tipa faktrabdoma arkitekturo (ekz. Braunlage), famaj kuraclokoj (ekz. Bad Harzburg), arbaraj migradvojoj, elvidejoj (ekz. Torfhaus kun bela panoramo al Brocken, la plej alta pinto de la montaro, 1142m).
La ĉefa celo de la ekskurso tra la okcidenta Harz-montaro estas la miljara urbo Goslar, fondita en 1009, nun havanta pli ol 40 000 enloĝantojn.
Ĝi estas perlo de la regiono, historia urbo en la listo de UNESKO-mondheredaĵo (kun la proksima minejo 'Rammelsberg'). La urbo apartenis al Hanso, la mezepoka germana komercligo, floris jam tiam kaj poste en la renesanco, akiris grandan politikan kaj religian gravecon, kaj danke al siaj minejoj ĝi fariĝis unu el la plej riĉaj urboj de tiama Germanio. Tio speguliĝas en la abundo da historiaj arkitekturaĵoj, plej unue en la centoj da tipaj faktrabdomoj.
Vizitindas la impona konstruaĵo „Kaiserpfalz”, la iama sidejo, palaco imperiestra. Allogas turistojn la belega urbodomo, la muzeoj, la ĉefplaco kun puto, sonorilludo, kafejoj, bierejoj.







### Hannover: TT1 - 19.07.2016, mardo

Ĝi estas la ĉefurbo de la federacia lando Niedersachsen (Malsupra Saksio).
La historia urbodomo kaj la operejo estas pompaj konstruaĵoj. En la urbocentro troviĝas multaj konataj magazenoj. La zoologia ĝardeno de Hannover estas unu el la plej belaj en Eŭropo.
La urborigardado enhavos vizitojn de la plej belaj konstruaĵoj, muzeoj kaj parkoj.

### Herzberg am Harz: DT2 - 21.07.2016, ĵaŭdo

Urborigardado kun ĉiĉeronado en la Esperanto-urbo, vizito al la kastelo, muzeo.
Rakontoj pri loka historio, legendoj; vizito al la Welf-kastelo kaj al la kastela muzeo, kie estas ankaŭ Esperanto-ekspozicia ĉambro.
Konatiĝo kun la Esperanto-vidindaĵoj (ZEOj) kaj aliaj allogaĵoj en la Esperanto-urbo.

#### Welf-kastelo en Herzberg am Harz

La kastelon mencias la unuan fojon dokumento de Henriko la Leono el la jaro 1154. La nuna kastelo estis rekonstruita post detruiga fajro en 1510. La kastelo estas kvar-ala konstruaĵo ĉirkaŭ meza korto. En la korto speciale allogas la kastela turo pro artaj ornamaĵoj laŭ la stilo Weser-renesanco. Ĝi estas la plej granda faktrabstila kastelo de Malsupra Saksio kaj grava konstruad-monumento.
La kastela muzeo prezentas plurajn valoraĵojn, estas tie ekspozicio pri la posedintoj, la Welf-familio kaj pri loka historio. La vizitantojn informas Esperantlingva komputila gvidprogramo. En alia etaĝo de la muzeo estas prezentata arbarhistorio kaj forst-administrado en la Harz-regiono.

#### Esperanto-muzeo

Ekde decembro 2009 konstanta tereno estas je dispono por Esperanto-ekspozicioj kun informtabuloj en la germana, angla kaj en Esperanto. En la vitrinoj kaj informkestetoj 2-4-foje jare Interkultura Centro Herzberg prezentas ekspoziciojn el la riĉa kolektaĵo de sia biblioteko, arkivo.

